

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 6.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

B. TITTL:

ESPERANTO EN LERNEJOJN.

La novaj kondiĉoj, kiujn eniris la bohemana nacio post reatingo de sia libereco postulas, ke krom granda vico da aliaj necesajoj eĉ ĝia lerneja sistemo asimiliĝu al la nova vivo.

Ni liberigis de la subpremo de germana despotismo, ni volas seniĝi eĉ de la germana kulturo pri kiu nin ĝis nun instruiniaj lernejoj kaj de kiu ni ĝis nun dependis, kaj ni volas aliĝi al la kulturo okcidenta. Nia peno estas — kaj eĉ nia nacia intereso tion postulas — anime eĉ ekonomie kuniĝi kun la nacioj, kiuj kun grandegaj oferoj forigis la regadon de la sklavanta kaj al la tuta mondo danĝera prusa militarismo kaj elbatalis eĉ al nia nacio ĝian sendependon kaj liberecon. Por fari ĉi tiun kuniĝon perfekta estas necese, ke la tuta nacio, aŭ almenaŭ ĝia pli granda parto sciu la lingvojn de tiuj nacioj. Kaj ĉi tion ne devas forgesi nia lerneja sistemo. Ĉi devas eĉ kompreni tion, ke nian junan ŝtaton kreas konglomerato de kvin nacioj en kiu la gvidanta nacio bohema ne devas kaj eĉ ne volas esti subpremanto, sed sincera kunulo de la aliaj nacioj, kaj sekve ke estas necese respekti la lingvajn bezonojn de ĉiuj nacioj en nia respubliko.

Kaj jen troviĝas la reformo de nia lerneja sistemo antaŭ tre malfacila problemo: Ĉu estas eble plenumi ĉi tiun postulon de la nova epoko? Ĉu estas por niaj infanoj eble eterni dum kelkaj jaroj krom granda vico de aliaj por nia vivo bezonaj scioj eĉ la konon de kelkaj lingvoj, kiuj estas necesaj por nia intelekta eĉ ekonomia vivo?

La solvado de tiu ĉi problemo, por nia nacio preskau fundamenta, jam per si mem atestas la neceson elekti komunan

B. TITTL:

ESPERANTO DO ŠKOL.

Nové poměry, ve které vešel český národ po znovudosažení své svobody vyžadují, aby vedle veliké řady jiných nutností i jeho školství se přizpůsobilo novému životu.

Vypravili jsme se z vleku germánského despotismu, chceme se zbavit i germánské kultury do nás až posud ve školách vštěpované, na které až posud jsme záviseli a osvojit si kulturu západní. Snahou naší je — a též národní náš zájem toho vyžaduje — abychom se duševně i hospodářsky sblížili s těmi národy, které s ohromnými obětmi zničily vládu zotročujícího a celému světu nebezpečného prusáckého militarismu a vybojovaly i našemu národu jeho neodvislost a svobodu. Má-li být toto naše sblížení úplné, je nutno, aby národ náš celý, neb aspoň ve své většině ovládal jazyky těchto národů. A na to naše školství nesmí zapomenout. Musí také vzít zřetel k tomu, že náš mladý stát tvoří konglomerát pěti různých národů, v němž vůdčí národ český nesmí a také nechce být utlačovatelem, ale upřímným druhem národům ostatním a že tedy je zde nutno, aby jazykové potřeby všech národností naší republiky byly náležitě respektovány.

A zde reforma našeho školství ocitá se před těžkým problémem: Je možno vyhověti tomuto požadavku nové doby? Je možno vštípití našim dětem během několika let vedle veliké řady jiných pro náš život potřebných vědomostí i znalost několika řečí, pro naše duševní i hospodářské styky velenutných?

Řešení této otázky, pro náš národ skoro základní, již samo sebou svědčí o nutnosti vyvolit společnou řeč pomocnou, jejíž za-

helplingvon, kies enkonduko forigos malhelpojn, kiuj alie renversados ĉiujn niajn penojn pri kunligo. Kaj jen estas la ĉefa kaŭzo kial la bohema nacio devas eniri en la fronton de la penadoj celantaj enkonduki komunan lingvon internacian, kaj kial eĉ en la la bohema lerneja sistemo ĉi tiu problemo ne devas esti neatentita.

La eldonantaro kaj redakcio de nia gazeto prezentis al sinjoro ministro de instruado peton pri enkonduko de Esperanto en la ĉeĥoslovakajn lernejojn, (kiun ni malsupre en traduko represas) kaj ni estas konvinkitaj, ke la tuta komunumo de niaj legantoj, kiuj estas loĝantoj de la Ĉeĥoslovaka respubliko, kune kun ni deziras, ke la postulon de ni prezentitan oni favore juĝu, ne pro interesoj de Esperanto kies amikoj ni estas kaj kiun en ĝia nuna disvastigo oni ne plu povas subpremi, sed ĉar ni deziras, de la Ĉeĥoslovaka ŝtato per la enkonduko de Esperanto en siajn lernejojn fariĝu la unua praktika solvanto de la ideo, en kiu kuŝas unu el la plej gravaj progresoj de la homaro.

PROpono

sendita al la ĉeĥoslovaka ministerio por instruado kaj nacia kulturo de la redakcio kaj eldonantaro de »La Progreso«. (Esp. traduko.)

Sinjoro ministro,

en la intelektaj kaj komercaj rilatoj, kiuj nun eksterordinare progresas inter la, per malsamaj lingvoj parolantaj nacioj, evidentiĝas la bezono enkonduki unu komunan helplingvon internacian kies tasko estus helpi al la plifaciligado kaj konservo de tiuj rilatoj.

La sennombraj faktoj atestas, ke tiu elektita lingvo povas esti nur lingvo vere neutrala, apartenanta al neniu nacio, sekvante lingvo artefarita.

Preskŭ ĉiuj pensuloj okupantaj sin per ĉi tiu problemo, konformiĝas en la opinio, ke la plej taŭgan solvon de la problemo de lingvo internacia donas Esperanto, lingvo kreita de d-ro Zamenhof kuracisto en Varsovio, kaj publikigita en la jaro 1887.

Ĉi tiu sistemo de lingvo internacia montris per sia neordinara flekseblo kaj taŭgeco esprimi eĉ la plej malsamajn ideojn kaj la plej delikatajn sentojn per absoluta klareco, tiel facilan lerno-kapablon, ke per malpena studo dum kelke da monatoj oni povas ĝin perfekte posedi. La praktikan kapablon de la uzado de Esperanto mon-

vedeni odstrani potize, které jinak podrážeti budou všechny naše snahy sbližovací. A zde je hlavní příčina proč český národ musí se postavit v čelo snaze, směřující k zavedení této jednotné řeči mezinárodní a proč v českém školství nesmí být tato otázka přehlížena.

Vydavatelstvo a redakce našeho listu podaly panu ministru vyučování žádost o zavedení Esperanta do československých škol, (kterou níže otiskujeme) a jsme přesvědčeni, že celá obec našich čtenářů, pokud jsou obyvateli Československé republiky, stejně s námi si přeje, aby požadavek námi předložený, byl příznivě vyřízen, ne snad pro zájem Esperanta, jehož jsme přáteli a jež při svém dnešním rozšíření se již potlačit nedá, ale proto, že si přejeme, aby Československý stát zavedením Esperanta do svých škol stal se prvním praktickým řešitelem ideo, v níž spočívá jeden z největších pokroků lidstva.

tras al ni ĝia nuna disvastigo, pri kiu traktas pli detale, al ĉi tiu skribaĵo almetitaj aldonoj.

En la konvinko, ke okaze de la nuna monda konstelacio, kies konsekvencoj estos pligrandiĝo kaj firmiĝo de la internaciaj rilatoj, atingos la neceseco disvastigi neutralan lingvon internacian la plej altan gradon, permesas al si la subskribintoj prezenti la sekvantan

propono:

La ministerio de instruado kaj de la nacia kulturo bonvolu en la lernejan kodon de la Ĉeĥoslovaka respubliko envicigi ordonon, per kiu oni enkondukas la instruadon de Esperanto en la burĝajn kaj mezgradajn lernejojn en la tuta nia ŝtato por unu klaso de la supre menciitaj institucioj.

Ni proponas la instruadon sole dum unu lerneja jaro, ĉar ni aprobas, ke ne estas utile per troa lernado superŝarĝi la lernantaron per plivastigo de la instrua materialo, krom tio la nekredible facila lernado de Esperanto donas plenan garantian, ke dum unuhora instruado semajne en unu jaro la lernantaro tute bone ĝin ellernos.

Ni permesas al ni rimarki, ke similan proponon al la nia prezentos al siaj registaroj ankaŭ la esperantistoj anglaj, francaj, italaj, polaj, aŭstriaaj, finnaj kaj magiaraj, kaj ni ne dubas, ke akcepto de ĉi tiu pro-

pono en unu ŝtato havos influon ankaŭ al la decidoj de ŝtatoj ceteraj.

El la tuta koro ni deziras, ke la sendependa Ĉeĥoslovaka respubliko fariĝu grava faktoro sur la kampo de la monda kulturo kaj en la interesoj ĉiuhomaraĵ, kaj pro tio ni petas, ke pri ĉi tiu propono oni serioze diskutu, kaj al la relativa traktado ni petas inviti ankau niajn reprezentantojn, kiuj aldone prezentos la necesajn klarigojn.

Plzeň, en monato majo 1919.

(Subskriboj.)

PORARTA EDUKADO.

(Enketo de ĉeĥa instruistaro.)

Ni intencas realigi interŝanĝon de pensoj kun la kolegoj de aliaj nacioj pri la kreaĵaj esprimoj de la infanoj. Ni volas tiamaniere akiri multajn impulsojn por ekkono de la infana animo kaj al kompletigo de la metodoj de la edukado porarta.

La interŝanĝo de la pensoj povus rilati ĉi-tiujn fakojn de la arteca edukado:

1. desegnaĵojn de la infanoj. 2. desegnaĵojn laŭ la naturo. 3. dekoraciajn desegnaĵojn. 4. modelaĵojn. 5. manlaboraĵojn, 6. ludilojn fabrikatajn de infanoj, 7. marionetan teatron, 9. stilajn laborojn.

Al ĉi-tiuj punktoj estas necese respondi kaj prilabori sekvantajn demandojn kaj temojn:

1. Kiel la infanoj montras sian kreaĵan kapablecon en la nomitaj fakoj de porarta edukado?

2. Listo de porarta pedagogia literaturo de koncerna nacio.

3. Akiro de ĉi-tiu literaturo.

4. Prizorgo de la tradukoj de eminentaj verkoj, eventuale de fragmentoj aŭ enhavoj en nian aŭ la internacian lingvon.

5. Interŝanĝo de kreaĵaj laboroj de infanoj.

6. Kiel la registaro subtenas la porartan edukadon de la infanoj?

7. Ĉu la lernejoj estas tiamaniere aranĝitaj, por ke ili subtenu la porartan edukadon? Priskribo de la interna aranĝo de la klasoj.

8. Proponoj pri la plibonigo de porarta edukado. Ĉi-tiujn proponojn oni povas ankoraŭ kompletigi kaj disvastigi.

Por la interrilato kun fremdaj kolegoj ni volas uzi Esperanton. En ĉiu pli granda urbo estas instruistoj-esperantistoj. Iliajn adresojn oni povas akiri facile el la

esperantaj adresaroj, pere de la esper. kluboj aŭ eĉ pere de ministerio de instruado (ankaŭ per Esperanto.) La rezultatoj de ĉi-tiu enketo, koncernante la signifon, kiun ĝi havas speciale por ni, povas esti publikigataj en Pedagogické Rozhledy (= Pedagogia Revuo) kaj en aliaj fakaj gazetoj, la informa parto en »Věstník« (= Buletino.) Por ke oni akiru la eminentajn kunlaborantojn de ĉiuj nacioj kaj por ke la profito de la laboroj povu esti publikataj en iu-ajn esperanta gazeto (ekz. Progreso, Esperanto k. t. p.) aŭ por la multpromesantaj rezultatoj povus esti fondita iu nova esperanta gazeto por artista edukado.

Tradukojn de kompletaj verkoj prizorgus la kolegoj-esperantistoj, la akiritaj fremdaj verkoj povus esti krom tio donataj al dispono al niaj kolegoj, konantaj fremdajn lingvojn por detala studado.

Por ke la enketo estu utila por artista edukado de la junularo la kunlaborado de multaj kolegoj estas necesa. Tial ni petas ĉiujn kolegojn, intersiĝantajn pri la porarta edukado, ke ili komuniku amabile la sekvantan:

1. En kiu fako de porarta edukado vi volas labori?

2. Ĉu vi konas Esperanton aŭ ĉu vi volas lerni Esperanton? (Neesperantistoj el lernas ĉi-tiun lingvon en du monatoj, por la kono necesa al korespondado sufiĉas ankoraŭ pli mallonga tempo.)

3. Ĉu vi volas nur prizorgi la interrilatojn kun fremdlando?

5. Ĉu vi donas viajn laborojn (verkojn, artikolojn) al dispono por sendi ilin en fremdlandon?

6. Ĉu vi volas la materialon akiritan el fremdlando, prilabori kaj prepari al presaĵo?

7. Ĉu vi havas kolekton de infanaj kreaĵoj por interŝanĝo kaj ĉu vi donas ĝin al dispono?

8. Kion vi proponas ankoraŭ laŭ la reala kaj formala vidpunkto, eventuale, kiel vi imagas la konkretan subtenon de tiu farado? Kun la laboro oni komencos tuj, kiam almenaŭ kelkaj kolegoj aliĝos. Ni petas eble plej grandan kaj plej fervoran kunlaboradon, por ke la enketo estu kiel eble plej kompleta.

Ĉiuj demandoj kaj komunikoj estu adresataj al sinjoro Jan Šembera, faka instruisto, en Brno, Haberlerova ul. 10. II.

Tradukis Marie Havránková.

P. S. Ĉi-tiu artikolo estis presita en la gazeto de organizita instruistaro »Věstník«. Mi prezentas ĝin nune al ĉiuj esperantistoj kaj petas ke ili ĉiuj serĉu kolegojn en tuta mondo, kiuj interesiĝas pri ĉi-tiu afero kaj mi ĝojas, ke ilia kunlaborado estos kiel eble plej granda. Por ke ni atingu ankaŭ la kunlaboradon de fremdaj ne-esperantistaj kolegoj, mi proponas al la legantoj de tiu-ĉi artikolo, ke ili traduku ĝin en la nacian lingvon kaj publikigu ĝin en kejkaj naciaj gazetoj. (Ni povas tiamaniere disvastigi esperanton) — Ni akceptas kun ĝojo ankaŭ fremdlandajn verkojn skribitajn en naciaj lingvoj. Kiu publikigos ĉi-tiun artikolon en iu-ajn nacia aŭ esperanta gazeto, bonvolu prizorgi 2—4 ekzemplerojn de tiu kajero por ni.

Kiu el la instruistoj interesiĝas pri muzika edukado? Kiu volus komuniki al ni, kiamaniere oni zorgas pri muzika edukado de la junularo en lernejoj? Ĉu oni instruas kantadon? Kiamaniere? Ĉu estas aranĝataj iaj koncertoj por junularo? Kiel? Kion oni faras ankoraŭ?

Kiu havas novajn pensojn kaj novajn proponojn, ne forgeson komuniki ilin per esperantaj gazetoj aŭ direkte.

Salutante ĉiujn kolegojn el tuta mondo, mi deziras plenan sukceson al ĉi-tiu enketo, kiu sendube alportos profiton al la edukado, al la arto kaj eĉ al la internacia lingvo!

Marie Havránková

faka instruistino

Prostějov, Pod Košířem 31.
Ĉeĥoslovakio.

ARNOŠT DENIS:

LA REVIVIĜO DE BOHEMOJ.

Amiko de Bohemoj, la famekonata franca scienculo, kiu ĉiam, eĉ antaŭ la terura milito, laboris por nia nacio, publikigis en komenco de la milito tiun ĉi artikolon, kiu en miloj da kopioj cirkuladis en nia lando; ni legis tiujn ĉi liniojn post bone fermitaj pordoj kaj ripeditis tiujn ĉi vortojn anstataŭ ĉiutaga preĝo. Ĝi revivigadis niajn fortojn por la plua rezisto kontraŭ malbenita Aŭstrio. Ni eksciis el tiu ĉi flugfolio, ke ni ne estas forlasitaj al nia sorto sed ke oni bone scias pri nia lando. Vorto post vorto plenumiĝas. Francio ne trompis nin. Aŭstrio, kiu tiel longe suĉis nian sangon, mortfalis kaj tombistoj forportas kadavron en la senfundaĵo de malbeno.

En jaro 1526. bohema reĝo Ludvík pereigis en la batalo apud Mohač. Venkintaj Turkoj okupis preskaŭ tutan Hungarion,

iliaj militistoj atakis jam Vienon, kaj Kriŝtanaro, kiu estis minacita per internaj bataloj, estis en granda danĝero.

Bohemaj regantaj klasoj opiniis, ke en tiu ĉi tempo, kiu minacis Eŭropon, estas devo ke la nacioj en la centra Eŭropo kunigi siajn fortojn. Tiel ili elektis por reĝo fraton de imperiestro Karolo V., Ferdinandon I. de Habsburk, kiu estis jam reĝo de germanaj provincoj ĉe centra Danubo, kiun en la sama tempo elektis por reĝo Hungaroj. Jen estas la deveno de monarkio Aŭstro-Hungara.

Reĝolando Bohemio ne estis de Habsburkoj militakirita. Bohemaj regantaj klasoj sole alvokis Habsburkojn sur tronon per libera konsidera volo. Tiu ĉi akto estis akompanata per klaraj, precizaj esceptoj. Inter Habsburkoj kaj la nacio oni interkonsentis traktaton, kiu kunligis ambaŭ partojn kaj kiu donis al Habsburkoj kiel tasko certajn devojn. Habsburkoj proklamis al la nacio, kiu konfidis al ili siajn sortojn, ke ili ĉiam atente staros por ĝia bono, sendependeco, lingvo k. t. p.

Sed ili plenumis eĉ ne unu promeson. De jaro 1526. estas historio de Habsburkoj senfina difektado de devoj kaj rajtoj. Inter ĉiuj Habsburkoj, kiuj reĝis en Praha, estis nek unu, kiu ne estus malamiko da la nacio. En libro de la nacia vivo ĉiu el ili restigis represajon de siaj sangmakulitaj manoj.

En momento, kiam Bohemoj libervole venigis sur tronon Ferdinandon I., ili havis post si bonegan historion, gloran klercon. Ilia martiro Johano Hus mortis en flamoj en Konstanco por doni ateston de vereco. Taboritoj (militistoj, kiuj post la bruligo de Hus defendis siajn rajtojn) levis siajn voĉojn kontraŭ tuta Eŭropo, ili dispelgis dekoble pli fortajn germanajn armeojn kaj ili portis venkantan kalikon de Balto ĝis Nürenbergo, de Vislo ĝis Danubo.

Habsburkoj havis nur unu ideon: pereigi tiun ĉi gloron, sufokigi tiun ĉi klercon, subpremigi boheman lingvon, kiu unua alportis al mirigita mondo iujn el plej noblaj principojn de moderna spirito. Heľcický kaj »Bohemaj Fratoj« de 15. jarcento proklamadis universalan pacon, egalan rajton de ĉiuj civitanoj, liberon de eklezio, fratecon kaj harmonion. Sed estis sankta devo nuligi tiun ĉi »malbonon« Habsburkoj uzis al tio malhavan de inteligenteco, kiu al ili ĉiam mankis, brutalecon, perforton.

Ferdinand I. komencis. Kiam en jaro 1547. ebligis al li la venko ĉe Mühlberg, kiam li siajn malamikojn venkobatis, li sendis al ekzekutejo tiujn Bohemojn, kiuj havis kuraĝon eldevigi plenumon de promesoj kaj li forigis el Bohemio parton da liberecoj, kiujn li ĵuris konservadi.

Je la komenco de 17. jarcento Ferdinand II. »senkorulo« post la malbenigita batalo sur la »Bílá Hora« (»Blanka Monto«), kie protestantoj estis venkitaj, li ne estis kontenta sole per tio, ke li destinis por morto la plej eminentajn boheman nobelojn, li eĉ plenumis abomenan intencon subpremi tutan nacion. Dekmiloj da plej bonaj filoj de lando ekziliĝis. Pezaj hufoj de dragonoj de Lichtenstein piedfrapis boheman teron, lingvon, nacion. Ĉio estis malbenigita, universitato forlasita, Praha estis makulita per sango kaj la nacio kun buŝumo ekdormis en mortdormo. Plej eminentaj filoj de nacio, kiel Komenius, mortis sur la fremdaj vojoj.

Horoj de malespero kaj sango, tagoj de plorado, kolero por Bohemoj... Habsburkoj ĝojiĝis! Ili finis malbonan laboron. Ili mortigis nacion, ili pereigis animon de nacio. Neniu libera voĉo estis aŭdebla. Por ke ili garantiu sian venkon, ili kaptis sian viktimon, ili volis pereigi historion, elradikigi eĉ rememoron je estinteco. Jarojn kaj jarojn ili militis kontraŭ la mortaj, bruligadis la librojn, disĵetadis rememoron je nacia arto.

Je la fino de 18. jarcento jam ŝajnis, ke estas tiu ĉi abomena laboro finita. Maria Teresia eĉ Jozefo II. opiniis, ke estas favora horo por disbato de la lastaj postesignoj de nacia sendependeco kaj por transformigo de reĝolando Bohemio en provinco Aŭstria. Ili ordonis al Bohemoj forgesi sian devenon eĉ lingvon, baptheadis ilin je Germanoj.

Sed perforto, kiel iam okazas kauzis miraklon. Kiel Polio eĉ Bohemio disbatis verecon de opinio, kiu forstrekas ilin el mondo. Viena cenzuro estis tre atenta eĉ lerta, sed ne estis kapabla haltigi misterajn ondojn, kiuj alvenadis el Francio. Marseillaise iris el unu flanko el unu lando en alian kaj kiel venksignalo de espero al subprematoj. Aro da profetoj, poetoj, filozofoj kaj historiistoj trevas denove ideon de siaj patroj. Sub la standardo de Dobrovský Kolár, Palacký, Havlíček, Rieger kuniĝis

nacio, bienmastroj, malgrandaj urbanoj, studentoj. Mortaj fordonis mortkitelon kaj sangiĝis en militistoj

En jaro 1848. kiam la Pariza venko en februaro signifas komencan de federalismo kaj demokratio, unua bato, kiu terenfaligis despotismon de Metternich kaj germanan birokracion, eliras el Praha. Ankaŭ Praha estas tiu, kiu printempe 1848, ĵetas en vango de germana kuraĝo la promeson de solidareco.

»Post la krucumigo kaj entombigo« skribas evangelio »kiam gardistoj ekvidis anĝelon, kiu malsupreniris el ĉielo, kaj sidiĝis ĉe enirejo al tombo, ili estis terurtrafitaj tiel, kiel mortaj: Habsburkoj ankaŭ ekteriĝis per teruro, kiam ili en estanteco denove renkontis kun la nacio, kiun ili jam entombigis, kaj kiun jam de du jarcentoj piedfrapadis iliaj helpantoj kaj sklavuloj. Tiranoj estas ĉiam timulaj, kiam mankas al ili forto; ili terenfalas en polvo. Habsburkoj humiliĝis, ili promesis ĉion, kion oni volis. Ankoraŭ unufoje ili sukcesis trompi Slavojn, kiujn povus jam scii, kio signifas promeso de Habsburkoj. Bohemoj forgesis centjarajn turmentojn, ili ekkredis denove al ĵuroj de Franz Josef I. kaj helpis al li levi kronon, kiu falis en koto kaj sango.

Malbona eraro, peka senprudenteco, kiu estis por ili tiel multekosta!

Reĝardo de Franz Josef I. estis malgaje longa. Ĝi estis nur senfina aro da malveroj, falsaj ĵuroj, malbonecoj kaj krimoj. Siajn Slavajn regatojn, kies sindonemeco savis en jaro 1848. dinastion, riskis imperiestro al obstina germanisacio de Stadioj, Baĥoj, al rabado de Vilemaj militistoj, al senhonta ekspluatado de Hungaroj. Ilia lingvo estis persekutata kaj blasfemigita, ilia klereco malrespektata kaj minacata, iliaj lernejoj fermataj, ilia literaturo subpremata, ilia presado estis cenzurata kaj konfiskata; ilia mastrumado malhelpata Superŝutitaj per kontribuoj kaj impostoj, ili estis oferataj al profito de Germanio kaj Hungario. Ili restis ofendataj en siaj plej belaj kaj plej sanktaj sentoj, kondamnitaj militiri kontraŭ sudaj Slavoj. siaj fratoj en mizero eĉ subpremato kaj kontraŭ Rusoj, siaj sopirataj savantoj; ili eltrinkis ĝis fundo maldolĉan kalikon de malhonoro kaj turmento.

Sed nenio daŭras eterne. Bohemoj rezignas je kontrakto, kiun ili konkludis en la tago de erarigo kaj kiun Habsburkoj ĉiam difektadis.

»Ni estis antaŭ Aŭstrio« diris historiisto Palacký antaŭ duonjarcento, »kaj ni estos eĉ post ĝi!«

Horo de la liberigo de nacio ekbatis. Aŭstriaĵoj Slavoj disŝiras nun kontrakton, kiun Habsburkoj ĉiam difektadis. Slovakoj, Moravianoj, Bohemoj eĉ Silezianoj! Nova vivo komencas por vi, subpremigitaj! Alvenis denove tago de gloro por posteuloj de batalantoj de Žižka. Liberigita Bohemio kungrupigis ĉirkaŭ si ĉiujn siajn filojn, disigitajn de deklivo de montaro Tatry ĝis Hory Krušné. Bohemoj denove absorbas sian rolon, kiu estas ilo de civiliza Eŭropo orienta kaj okcidenta, ili denove estos apostoloj de evangelio de libero, justeco kaj homeco, kiuj en 15. jarcento predikis fleičický. (Bohema eklezia filozofa).

Franz Josef I. vivis nur tiel longe, por ke li povu pagi justan punon, de siaj eraroj kaj krimoj. En lastaj jaroj oni rakontis stultan legendon ĉirkaŭ tiu ĉi malbona maljunulo, kiu ekregis kun sangemakulitaj manoj, kiu finis sian regadon inter sango-verŝado. Tiu ĉi kavaliro havis eĉ ne tion da ordinara honto, por ke li konserviĝu malamon al humiligoj kiuj lin blasfemigis, kaj konsentis fariĝi alpendaĵo de pirataj Hohenzolerno, kiuj atakis lian rezidencurbon. Tiu ĉi katolika princo sendis siajn regimentojn helpi al kanajloj, mortigintoj, bandidoj, kiuj rabas kaj bruligas katedralojn. Lia privata vivo estis sen indeco, kaj lia publika vivo sen honoro. Li perfidis siajn plej sanktajn promesojn. Edzo sen delikateco, patro sen amo, bigotulo sen kredo, reĝo sen kuraĝo, nobelo sen honoro, kaj mortinsida malamiko de Bohemoj eĉ ĉiuj Slavoj reprezentas bone dinastion de Habsburkoj, kiu naskiĝis eĉ ne unu grandan reĝon, eĉ ne unu honoran homon. Kun li terenfalas Aŭstrio, pri kiu diris Gladstone, ke naskiĝis en mondo sole malamon.

En nova Eŭropo, kiu ĝus naskiĝas, ne estas jam por ĝi loko!

Tombisto, forpurto tiun ĉi mortajon!

Estu sur ruinaĵo de ĝi mondo de paco, libereco, frateco!

Lokon por bohema nacio!

Tradukis Xaver Kučera.

PORPACA LIGO.

League to Enforce Peace
(Interligo por Certigi Pacon)
130 West 42nd Street,
New York, Usono
Allan P. Ames, Sekretario
Komitato pri Informado.

Al la tutmonda esperantistaro.

La esperante verkita alvoko, kiun alsendis la Interligo por Certigi Pacon al la tutmondaj Esperantistoj, elvokas korajn respondojn. Ĉe la centra oficejo de la Interligo, New York, oni estas ricevinta leterojn de Esperantistoj en la franca kaj belga armeoj, de civilduloj en Francio kaj en Granda Britio kaj de Esperantistoj en Usono.

Ĉiuj el ili aprobas la penson esprimitan de William H. Taft, la prezidanto de la Interligo por Certigi Pacon, ke tio ĉi estas milito en kiu la malamikoj de Germanio forjetis la glavingon, kaj batalos ĝis vera paco estos certigita.

Estis klare ke la senditaĵo en la tutmonda lingvo multon signifis al tiuj Esperantistoj kiuj dum monatoj aŭ eĉ jaroj bataladis kontraŭ la ĉefmalamiko de la paco, super kies kapoj tagon kaj nokton la morto kriegadis, kies okuloj malheliĝis pro ĉiutage renovitaj teruroj. Tiuj Esperantaj soldatoj meditis dum ili batalis. Kio devus esti la fino? Ĉu ambaŭ kontraŭstaruloj devus batali ĝis la preskaŭ mortiga lacego, kaj tiam ripozi nur ĝis unu aŭ la alia reakirus la forton?

Ne tiel opiniis tiuj ĉi viroj. Ne pro tio ili bataladis; ne pro tio ili estis pretaj fordoni sian vivon. La kontraŭbatalantaj nacioj devas iel interproksimiĝi; ili devas popolamase iel interkompreniĝi. Nur tiam povus veni la vera paco.

Sed la bataloj daŭris de tago al tago, fariĝante eĉ pli furiozaj; kaj de monato al monato ili trovis novajn pruvojn de la diableco de siaj malamikoj. Dum la milito daŭris, la ebleco atingi interkonsenton aŭ trovi bazon por reciproka fido verŝajne malpliĝis. Tiam venis la senditaĵo de la Interligo por Certigi Pacon, voko de espero kun neta de aŭtoritato.

»Sciĝinte antaŭ nelonge pri la Interligo por Certigi Pacon,« skribas franca Esperantisto en sia nacia armeo mi plej plezure uzas ĉi tiun okazon por diri al vi mian ĝojon, ke fine en la mondo ĉiuflanke naskiĝas movoj por certigi la plej altvaloran bonajon por la homaro: la pacon.

»Nuna en Eŭropo okazanta abomenaĵo indignigas eĉ plej funde kvietajn homojn, kaj ĉiuj havas tiun laŭte kriatan vorton: neniam plu ekzistu tia abomeno! Kiel okazas ĉiufoje, kiam iu demando estas solvinda, prezentigas pli malpli da solvoj, jen raciaj, jen neraciaj, jen eĉ malraciaj.

»El la solvoj de nun aperantaj kiel pacigiloj, mi opinias, ke alpreno de komuna lingvo estus por ĉiuj civilizitaj popoloj rimedo ŝajnanta al mi nepre trafa.

»Pri la taŭgeco de komuna lingvo por certigi pacon, la franca historio liveras al ni nerifuteblan kaj plej atendindan pruvon.

»Ĝis la „Revolucia Epoko,” tio estas ĝis jaro 1789a. Franclando estis dividita en 32 provincoj kies enloĝantoj parolis apartan lingvaĵon. Estis do tiam en mia patrolando ĉirkaŭ tridek parcelataj lingvaĵoj. Senĉese tiuj provincoj militis unu kontraŭ alian. La Revolucio, krom tio, ke ĝi partigis Franclandon en proksimume grandaj departmentoj, unuigis la lingvon de ĉiuj departmentoj, trudante ĉie la lernon de oficiala franca lingvo.

»De tiu epoko oni neniam vidis unu departmenton militi kontraŭ najbara departmento! La rilatoj, kiuj inter la provincianoj estis malfacilaj pro malsameco de la lingvoj, iom post iom intensiĝis pro la facila interkomprenebleco kaj pro tio—precipe pro tio—ke ĉiuj francoj sin pli bone konis; ĉar ili povis tiam kunparoli kune, ili komencis interfratiĝi.

»Sekve, ĉar nia planedo estas grandega nacio dividita en grandaj provincoj parolantaj apartan lingvon, tial enloĝantoj de tiuj provincoj ne povas interrilati inter si, kaj tio naskas eblecon de milito. Oni alprenu komunan lingvon, kaj per ĝi la homoj interrilatos kaj interkonatiĝos; kaj tiam, ĉar la plej grava militkanzo estos neniigita, ekregos la paco, benata kaj tiel bonfaranta por la homara bonaĵo.»

El la leteroj kiujn la Interligo ricevis, ŝajras ke la francoj, spite de la longa uzado de sia lingvo kiel la diplomata lingvo, estas preskaŭ la unuaj kiuj klare vidas la utilojn de tutmonda lingvo, kaj ke ili plej rapide komprenas ke la Interligo por Certigi Pacon kaj la Esperantistoj marŝadas flankon ĉe flanko al la sama celo.

Franca Esperantisto en la vicoj de la franca armeo estis meditinta dum la pafado pri la valoro de Esperanto por propagando; kaj la ricevo de la senditaĵo de la Interligo por Certigi Pacon »duoble batigis« lian koron, subite sciigante ke aliaj sammaniere pensadis.

»Permesu la modestan francan soldaton kiu mi estas«, li skribas, »sendi al vi miajn korajn gratulojn por la bona ideo kiun vi havas, presigante tiun skribaĵon en Esperanto; ĝi duoble batigas mian koron, ĉar mi tre ofte demandis min, kiam do oni fine komprenos la utilecon de Esperanto kiel propagandilo en tiu ĉi milito, kaj ankaŭ ke neniuj societo de la nacioj ekzistos praktike ĝis kiam oni akceptos Esperanton kiel helpa lingvo.»

»Al la personoj kiuj dubas pri la utileco de internacia lingvo, mi nur diras, ili venu Francujon: ili vidos la malhelpaĵojn kiujn ni konstante havas kun niaj kunliganaj fratoj; kaj ili komprenos ke krom facila lingvo kiel Esperanto neniuj lingvoj, eĉ la angla, espereble sukcesos.«

»Vere via presaja donas voĉon al mia sento,« skribas C. D. Gibson, angla Esperantisto. »Ni devas batali, batali, kaj ĉiam batali kontraŭ la germana nacio, ĝis la spirito de paco supervenkos la spiriton de malpaco... Kiam oni pensas pri la kruelaj agoj de la tiel nomataj kulturistoj, oni miras kio okazus al la popolo de l' tuta mondo, se la propagandistoj de l' germana kulturo sukcesus.«

Hugues Gauthey, pariza Esperantisto, skribas ke li kortuŝe legis la senditaĵon al Espe-

rantistoj; ke la idealoj esprimitaj de S-ro Taft estas ankaŭ la liaj, bele kaj sincere elparolitaj; kaj ke li atendas plian informon pri la Interligo por Certigi Pacon, por ke li povu fariĝi fervora propagandisto por ĝi. Kiel la aliaj kiuj skribis respondante al la alvoko, S-ro Gauthey kredas ke la akcepto de internacia lingvo firmigus la fundamenton de paco, kaj faciligus la laboron de la Interligo por Certigi Pacon.

Per la tradukado en Esperanton de la parolado de S-ro Taft la Interligo por Certigi Pacon ekkaptis batalilon kiun Germanujo mem penis uzi plifruue dum la milito. Inter aliaj lingvoj ili elektis Esperanton kiel propagandilon; kaj ili penis per la uzado de la lingvo gajni la favoron de la Esperantistaro por la germana afero.

La provoj malsukcesis; kaj oni forlasis la penon. Oni diras ke unu el la motivoj pro kiuj la germanoj ĉesis uzi Esperanton estis ilia deziro starigi la germanan lingvon kiel tutmondan lingvon, pro kio ili opiniis ke kiam ili helpis la uzadon de Esperanto, eĉ por meti germanajn argumentojn kaj asertojn en la manojn de Esperantistoj, ili subtenis danĝeran konkuranton al la germana lingvo.

La malgrava impreso de la germana provo vidigas el la respondoj ricevitaj de la Interligo por Certigi Pacon post la sendo de ĝia alvoko al la Esperantistaro. La supre presitaj estas nur specimenoj. Leteroj ĉiutage alvenas al la centra oficejo de la Interligo New York, parolante pri la plia progreso de la ĉie disvastigita armeo da broŝuroj, kiujn ĝi elsendis vestitan en la uniformo de Esperanto, kaj pri la intereso vekita de tiuj ĉi antaŭkurieroj de justa paco en malproksimaj regionoj de la mondo.

Sv. J. Degenkamp, Utrecht:

LA DEMANDO PRI LA RESPONDECO.

La demando pri la respondeco por la mondimito kaj pri la punado de la kulpuloj montras sin ankaŭ en Parizo pli malfacile solvebla ol oni ĝis nun opiniis.

La komisio al kiu oni prezentis la ekzamenon de tiuj ĉi punktoj ne ankoraŭ konkludis, kiamaniere agi en tiu ĉi afero. Sed ĉiam ankoraŭ estas eble, ke oni trovos la solvon, pro kiu la eksimperiestro estos ekziligita al iu insulo, same kiel okazis al Napoleono. Se oni decidus en tiu ĉi direkto, tiam venos la demando kiamaniere laŭleĝe oni eligos lin el Nederlando.

La princo de Monako, iama amiko de Germana imperiestro interparolis kun la Pariza raportisto de la »Daily Mail«, kiu demandis lin, ĉu la imperiestro volis la militon. La princo respondis, ke pri tio li nun ne plu povas dubi, kvankam ŝajnis, ke ankoraŭ kelke da jaroj antaŭ la milito la imperiestro faris sian devon konservi

la pacon kaj klopodis plibonigi la rilatojn kun Francio. Sed poste vekigis en li terura malhumileco kaj li volis vidi Germanion superanta ĉiujn aliajn landojn. Kiam li konsciigis, ke tio ne estas atingebla per pacaj rimedoj, la milito fariĝis en li absceso. En julio 1914. la imperiestro diris al la princo: »Se oni devigos min militi, la mondo travivos ion, pri kio ĝi eĉ neniam sonĝis.« La princo opinias, ke la imperiestro sendube kauzis la militon. Absolutisma monarĥo devas ekcepti tiel la rajton, kiel la respondecon pri sia absolutismo. Do, kial tiu ĉi krimo kontraŭ la homaro restus ne punita?

Sed Bernstorff rakontas, ke al lia demando, kial siatempe decidis la senlimitan submarboatan militon, pro kiu estis neniigita la pacperado de Wilson, oni respondis al li, ke la publika opinio en Germanio ne estus tolerinta alian solvon.

Ankaŭ la germana popolo do ne estas tute senkulpa. Oni memoru eĉ la »Centrum« — organon, kiu ĉiutage defendis la submaran militon kaj ĝin gloris.

PIŠŤANY — MONDA BANURBO.

Unu el la plej grandaj, plej modernaj, situacie plej belaj kaj je fontoj plej riĉaj banlokoj de ĉeĥoslovaka ŝtato estas la banurbo Pišťany, kiu jam dum la pasintaj jaroj akiris bonfamon en tuta Eŭropo kaj kiu en estontaj jaroj fariĝos ankoraŭ pli konata kaj pli serĉata. Jam la vojaĝo per vagonaro al Pišťany de Trenčín, aŭ en ma la direkto de Trnava estas tre interesa. Ni vidas ĉi tie orbrilan strion de slovakaj lando, senfinan ebenajon, kiel nenie en Bohemio kaj Moravio, ne trarigardeblan regionon, ebenan kiel tablo, abunde fruktodonan. La plej bela ornamo de la banloko estas la rivero Váh, kiu ĉirkaŭas per sia plena fluo kaj per siaj brakoj la tutan banlokon. Belegan panoramon sur la riveron Váh ebligas al ni ĝia ponto, kondukanta al la sur insulo »Ligotič« troviĝanta banloko. Grandegaj modernaj kuracdomoj estas ĉirkaŭataj de bela parko. Ne pre fabela panoramo estas de la orienta parto de la banloko al »Malgrandaj Tatroj« bluiĝantaj arbaroj sur altaj montoj. La piŝťanaj fontoj estas nepre grandiozaj. La varmaj fontoj enhavas bolantan akvon (70°).

La sulfurecaj banoj efikas mirakle je diversaj malsanoj, speciale reŭmatismo kaj isĥias. Kie ajn oni ĉe la insulo iom fesas, tie tuj trapenetas el la tero bolanta akvo kaj surfundiĝas sulfureca ŝlimo. Ĉe la rivero Váh lavas virinoj tolaĵojn eĉ dum la plej granda malvarmo en bolanta akvo, kiu elfluas el la tero en la riveron. Specialistoj de la tuta mondo esprimis sian admiron pri la potenco de piŝťanaj fontoj. La slovaka registaro komisiis la administradon de la banloko al doc. Dr. Kučera el Praha, kiu jam entreprenis la malfacilan taskon venigi la banlokon sur la plejmodernan ŝtupon rilate la kuracarto. La urbo havas

8.000 da loĝantoj. Ĝis 20.000 da bangastoj vizitadis ĉiujare la banurbon. Inter ili estis la plej granda parto da Germanoj. Por la eksreĝo de Bulgario estis Pišťany la la plej amata banurbo. Sed ĉi tien alvenadis ankaŭ anglaj, francaj kaj italaj diplomatoj kaj eminentaj reprezentantoj de financaj kaj komercaj rondoj eŭropaj. La ĉeĥoslovaka registaro certe zorgos pri tio, ke tre granda nombro de la resanigon serĉantaj personoj trovos ĉi tie tre agrablajn restadejon.

Lau artik. de Trapl, trad. Ant. Kudela.

J. S. TURGENĖV:

PREĜO.

Pri kio ajn la homo preĝas — ĉiam li postulas miraklon. — La senco de la preĝa teksto estas eble jena: »Granda Dio faru ke — dufoje du ne estu kvar!«

Sole la preĝo vizaĝ' al vizaĝo estas preĝo vera. Preĝi al la Spirito de Ĉiopova, al la Plejponteca estulo al Dio de Kant, de Hegel, al la puriĝinta Dio senvizaĝa - tio estas ja absurdaĵo ne pensebla.

Sed ĉu eĉ Dio persona viva, sentojn havanta povas fari ke dufoje du — ne estu kvar?

Ĉiu kredulo estas devigata respondi: Dio povas fari tion — jes, ĉiu estas devigata sin mem konvinkigi pri tio.

Sed se kontraŭ tia sensencaĵo ribeliĝos lia propra intelekto?

Tiam denove helpos al li Shakespeare: »Ekzistas multaj aferoj en la mondo, kara Horac... k. t. p.

Kaj se oni protestos kontraŭ li en la nomo de la vero, — estas necese, ke oni ripetu al li la signifoplenan demandon: »Kio estas vero?«

Kaj pro tio ni trinkos, ĝojos, kaj preĝos,
Trad. Em Kubásek.

FILOZOFIO DE VIVO.

Laŭdis al si hundo koton, ke ĝi mole en ĝi marŝas, laŭdis la vintron, ke ĝi ne ekhavas sunbruligon, laŭdis la ĉenon, kiu al ĝi senhaŭtigis la kolon, ke ĝin forte alforĝitan neniu povas ŝteli, laŭdis la malsaton, kiu ĝin konservas en korpelasteco kontraŭ malnobla dikeco kaj en la vigleco de senco, laŭdis eĉ insultojn de la sinjoro, ĉar ĝi estas principa malamiko de ĉiu flatado.

Miregis pro tio naŭva ansero.

»Bona amiko«, ĝi miris, »kion vi laŭdas, vekas mian ekmiron. Laŭdu mizeron, kiel vi volas, per tio vi ĝin ne ŝanĝos. Tiom da filozofio mi al vi aljuĝis.«

Skuetis kapon la hundo kaj indulge rigardis la naŭvan anseron. »Bonajn aferojn« ĝi diris, »ne estas necese laŭdi — ili sin laŭdas mem, sed en ĉiu mizero estas necese trovi ion bonan por ke oni povu ĝin pli facile toleri.«

El. Fr. Procházka, tradukis B. Oštdál.

LA SORTO DE BOHEMA VOLAPŬKISTO.

En amaso da leteroj, kiujn ĉiutage ricevas nia redakcio mi trovis antaŭ kelkaj semajnoj unu, kiu speciale min interesis. Speciala manuskripto vekis mian atenton. Mi fortranĉas la koverton kaj rigardas la subskribon: Bakalář-Srbecký. En la sama momento trakuras mian cerbon la memoro — ke tiu ĉi sinjoro estis la unua propagandisto de Volapük en la bohemiaj landoj kaj eldonanto de ĝiaj lernolibroj, ke post la publikigo de Esperanto li proklamis: »Mi devas konfesi, ke Esperanto ĉiurilate superas Volapükon« kaj ke li fariĝis esperantisto. Antaŭ dek jaroj mi eĉ trovis bildon de tiu sinjoro en Ĉas. Ĉes. Esp., kiun eldonadis so. Ed. Kühnl, sed de tiu tempo — kvazaŭ li estus falinta sur la fundon de la maro — mi nenion aŭdis eĉ legis pri li. Mi jam kredis, ke li ie ripozas en eterna dormo, kvankam mi ne povis kompreni, ke en neniuj gazeto oni menciis la morton de tiu ĉi malnova propagandisto de la mondlingvo. Tial avide flugas miaj okuloj sur la linioj de li skribitaj: Li petas sendadon de nia gazeto kaj samtempe li esprimas sian opinion pri la uzado de la vortoj »Ĉeĥo« kaj »Bohemo«. Li finas sian leteron per la devizo »Vivu Esperanto!«

Mi senprokraste respondis al tiu estiminda sinjoro, petante kelkajn datojn pri lia nuna farto, kaj post kelkaj tagoj mi estis ĝojigita per nova letero — kies enhavo min kortuŝis.

Li sciigas min: »De la jaro 1887. mi laboras sur la kampo de la mondlingvo kaj de tiu tempo mi devis multe suferi de »niaj« homoj, kiuj ofte riproĉis min, ke mi propagandas la lingvon de socialistoj, kaj tiukaŭze — estante denunciita ĉe la Viena ĉefepiskopo Nagl — sen ĉiu ajn protokolo kaj sen gravaj motivoj oni donis min en pension kun negrava monsubteno, kaj — mi preskaŭ hontas tion konfesi — mi vivas en granda mizero... En la jaro 1887 aperis en Brno en gazeto »Correspondent« mia portreto kun la rimarko »I. diplomita instruisto de Volapük en Moravio« kaj tiam diris al mi la episkopo Baŭer en Brno: »Vi aspektis tie kiel leŭtenanto kaj ne kiel pastro — nia pastraro incitiĝis pro tio«. Kaj tiam ĝi komencis... Jam antaŭ la milito nia nuna kara prezidanto Masaryk skribis al mi: »Vi estas ofero de la sistemo...«

Do, tiu ĉi sorto estis destinita por la unua propagandisto de la mondlingvo en nia lando. Jes, li fariĝis ofero de la sistemo, de tiu sistemo, kiu unuflanke predikas religion de Amo kaj aliflanke senkompatas ĵetas en melfeliĉon eĉ sian propran servanton, kies animo — ne estante sufokita per balasto da dogmoj — proksimiĝas senpermeso al la Vivo.

Mi prezentas al mi la nunan vivon de tiu okdekjara maljunulo kun katarakto sur la okulo — sekve duonblinda, kies enspezoj ne sufiĉas por trankvila vivado, sed tamen sufiĉas por ne morti pro malsato. Kiajn perspektivojn li havas por la estonteco! Scio de propra, per si mem ne kaŭzita mizero, kiu sekvas nin ĝis lo tombo povas la homon eĉ anime ruinigi. Ni, kiuj volas fratigi la mondon per konkordo de helpa lingvo internacia, ni kiuj deziras la mondon pli bona, ni ankaŭ — laŭ nia eblo — viŝu la larmojn, kiujn elpremas malfeliĉo. Ni helpu tie, kie ni povas. Kaj jen ni havas bonan okazon helpi, helpi al nia propra homo, kiu pro niaj ideoj estis persekutata.

De sinjoro Srbecký mi petas pardonon, ke mi tie ĉi publike petas monsubtenon por li. Mi scias, ke por multaj homoj estas humiligo proponi al ili monan helpon — kaj eĉ ne so. Srbecký estas alia. Tamen mi sentas la devon atentigi la esperantistaron pri lia malbona situacio, kies malhelon ni povas lumigi per la radio de la Amikeco. La sendaĵojn, kiujn kolektas nia administracio ni kvitos en nia gazeto sub la devizo »Al helpo«.

B. Tittl.

Voĉo:

VOĈO DE VIRINO.

Ho, nia kara Respubliko ĝoju, ni, viaj fidelaj anoj, ni ĉiuj, kiuj rajtas porti la verdan signon de la granda tuthomara Amo, ni ĉiuj, kiuj eklernis la dolĉan lingvon de la prirevata tutmonda Frateco, por uzi ĝin buŝe kaj skribe, hejme eĉ trans la limoj, ni ĉiuj, kiuj, rajtas esti nomataj »esperantistoj kaj esperantistinoj«, ni ĉiuj volas efike kaj energie labori por Viaj bono kaj gloro!

Ni plene konscias, ke la manoj de la esperantistoj estas uzotaj por la skriba informado, ni do klopedos eviti ĉiujn neutilajn kaj negativajn sciigojn rilatante kun la fremdlando.

Pri Vi, pri Via naskiĝo, pri la zorgoj kaj doloroj de Viaj infanoj, pri Viaj ĉiamaj malamikoj, pri la beleco de Viaj urboj kaj montoj kaj valoj ni parolas al la fremda samideano.

Ni laŭeble helpas al tiuj, kiuj havas la devon konigi kaj disvastigi le informojn pri vi por la komuna bono de la tuta Ĉeĥoslovaka ŝtato.

Jes, tion ni promesas.

Tiel-kaj simile meditadoj kelke da ĉefaj samideaninoj, kiuj estas membroj de la »Rondeto de esperantistinoj« en P.

Ĉiu el ili estas preta fariĝi semistino de la nova Amo, sed, ĉiu el ili estis dolore frapita, eksciiginte, ke tiuj el niaj samideanoj, kiuj instruas la neesperantistan publikon interalie ankaŭ pri la esperantistaj organizoj de nia ĉefurbo, forgesis mencii la nomitan »Rondeton de esperantistinoj«, kiu ankaŭ deziras servi al nia Respubliko pere de Esperanto.

Ĉu la virina laboro ne estas egabraja?

ĈEĤOSLOVAKIO.

Reformo de edzeca leĝo, kontraŭ kiu plej energie batalis katolika partio, estis decidita la 22. majon en la nacia parlamento ĉeĥoslovakia. La nova leĝo enkondukas fakultativan edziĝon civitanan, permesas plenan disiĝon en certaj gravaj kaŭzoj kaj permesas edziĝon al la ekspastroj de katolika eklezio. Por la nova leĝo voĉdonis escepte la klerikalan, ĉiuj aliaj partioj.

Kontraŭ akaparo. En Praha kaj alie okazis en 21. — 24. majo grandaj manifestacioj kontraŭ akaparo, kiujn vico da krimaj individuoj eluzis por rabado kaj ŝtelado ĉe granda vico da komercistoj en diversaj kvartaloj de Praha. La manifestacioj tuj ĉesis, kiam la respublika registaro proklamis energian batalon kontraŭ akaparo, ordonis inventarigi ĉiujn provizojn ĉe la komercistoj kaj alvokis reprezentantojn de la laboristaro por gardi la komercejojn. Speciala komisiono fiksas prezojn por ĉiuj objektoj de popola bezono. Ke la popola manifestado kontraŭ la kareco estas rajtigita, tion pravas jenaj prezodiferencoj de diversaj manĝaĵoj el la jaroj 1914, kaj 1919, kiujn ni represas el Věstník ministerstva pro zásobování lidu (Bulteno de la ministerio de popola provizado): Pizoj: K 0.32 — K 8.—, kafo: 2.20 K 80 — 100, faruno: 0.42 — K 10 — 16, terpomoj: K 0.07 — K 2 — 3, graso: K 1.50 50 — 70, lakto: K 0.24 — K 2 — 3, ovoj: 0.80 — 0.90, porkaĵo: K 1.60 — K 30 — 40, bovaĵo: K 1.60 — K 12 — 20, k. t. p. La salajroj kontraŭ tio estis nur du ĝis triobligitaj.

Škodovy závody — Skodawerke, la fama aŭstria kanonfabriko en Plzeň transiris post la likvidacia ĝenerala kunveno de la akciuloj en la posedadon de bohema kapitalo. Ĉefa kunposedanto estas la plej grava bohema financa entrepreno »Živnostenská banka«.

La vivkondiĉoj de la instruistoj en Ĉeĥoslovakio, kiuj ĝis nun viciĝis inter la plej mizerajn en ĉiuj klasoj estis reguligitaj per la decido de nacia parlamento. Laŭ tiu ĉi decido estas la instruistaro per sia salajro egalrajta al la ŝtata oficistaro.

Jubileo. Národní Listy, unu el plej gravaj ĉefaj gazetoj festas strangan jubileon: antaŭ unu jaro estis malpermesita ĝia aperado »... pro tute ne permesibla skribadmaniero.« Antaŭ unu jaro havis tiu ĉi gazeto ĉe la aŭstria registaro multajn kulpojn kaj sekve oni ne povis esperi, ke la ministro Hussarek permesos baldaŭ ĝian reaperadon. (Posedanto de Nár. Listy estis dro. Kramář) tial la eldonantaro decidis eldoni novan gazeton: »Národní Noviny«. Sed post unusemajna daŭro de sia »esperplena« vivado venis nova fermano, kiu kondamnis eĉ ĉi tiun gazeton al la morto. En monato julio, kiam estis klare, ke la militfeliĉo transiras al la flanko de Entento, la aŭstria registaro proklamis, ke ĝi »sub certaj garantioj« permesos la reaperadon. Sed la redakcio obstine silentis trankvile atendante la sekvojn de la ofensivo de Entento. Dume evidentiĝis ke tiu ĉi baldaŭ sukcesos — kaj el Vieno venis permeso de nova reaperado sen ĉiu ajn garantio. Kaj la Monarkio falis . . .

Soldatoj! Al la ĉeĥoslovaka respubliko ĝis nun proponis siajn servojn 35.467 oficiroj (rezervaj kaj pens.) el kiuj oni akceptis nur 9.692. Inter la rifuzitaj estas la »famaj sinjoroj« gen-oj Aufferberg, Böhm-Ermoli, Zannantoni k. a.

Dummilita persekutado de Ĉeĥoj montras jenan statistikon: Malliberigitaj kaj internigitaj estis 3500 personoj, de 1a 1. marto 1917 ĝis 28. oktobro 1918 estis politike persekutitaj 26.800 personoj, mortpafitaj kaj sur eŝafodo ekzekutitaj estis 1505 personoj.

Komunumaj balotoj laŭ la nova leĝo okazos la 15. junion. Germanoj loĝantaj en Praha decidis por tiu celo kuniĝi (burĝoj kun social-demokratoj) kaj prezenti komunan kandidatliston.

Germanaj gazetoj alportas mensogajn sciigojn pri interna stato de Ĉeĥoslovakio. Fremdlandaj samideanoj, kiuj bezonas raportojn pri la vivo en nia lando sin turnu al la ĉefaj esperantistoj aŭ al nia redakcio, kiu garantias plenan verecon por siaj raportoj.

	DIVERSAĴOJ.	
---	--------------------	---

Enkonduki Esperanton en lernejojn estas en la nuna tempo nia ĉefa celo. Al nia ministerio de instruado estis jam senditaj tiuspecaj proponoj el la rondo de bohemiaj esperantistoj, kiuj en sia enhavo estas tute malsamaj. La eldonantaro kaj redakcio de La Progreso nun prezentas sian zorge ellaboritan proponon, kies trustudon ni rekomendas al nia legantaro. En la intereso de la afero mem en kiu ni devas labori en absoluta konkordo kaj unueco ni petas ĉiujn societojn, kiuj antaŭe prezentis sian proponon pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn de Ĉeĥoslovakio ke ili per kelkaj linioj sciigu la ministerion, ke ili aliĝas al nia propono, kaj ke ili tute konsentas kun ĝia enhavo. Subtenu ĉiuforte nian proponon! Ĉiuj esperantaj societoj de nia ŝtato sendu tuj al la ministerio la proklamon, ke ili aprobas la proponon de ni prezentitan. Instigu eĉ aliajn societojn (neesperantistajn) subteni nian proponon. Penu, ke eĉ germanlingvaj societoj aliĝu al nia propono. Amikoj esperantistoj, ni vokas al Vi: ni venas al la decida momento! Ĉiu laŭforte en batalon por enkonduko de Esperanto en la lernejojn!

Vojaĝon tra Anglio entreprenos en la monatoj septembro kaj oktobro so. B. Tittl, red. de La Progreso. Li parolados en diversaj urboj pri Ĉeĥoj antaŭ la milito, dum la milito kaj post la milito, por tiel konatigi Anglojn kun la historio, dum milita suferado kaj novtempaj idealoj de sia nacio. Lia parolado akompanata kun multegaj lumbildoj, prezentantaj la kortuŝajn scenojn el la tempo de aŭstria »regado« (mortpafado kaj pendigado de Ĉeĥoj, tuja juĝo en bohemiaj urboj k. p. t.) kaj el la tempo de la renverso prezenta historiajn faktojn pri la regado de »germana pugno«. Al la parolado, kiu estos prezentita en la lingvo angla, la parolanto aldonos kelkajn notojn pri la neceseco enkonduki lingvon internacian.

So. R. de Sausure denove reformasi La fama fabrikisto de la »reformoj« de Esperanto, so. dro. R. de Saussure, kiu post multaj malsukcesoj en la reformado ĉiam denove revenas al la fundamenta Esperanto kaj kiu en julio de la pasinta jaro komencis eldoni la Teknikan Revuon, anoncas en la 5. kajero de sia gazeto, ke: »post longa hezito li decidis prezenti nun sub definitiva formo (!!) provon de reformo de Esperanto...« Plue li diras, ke »tiu ĉi provo ne estas nova propono, sed sintezo de ĉiuj antaŭaj proponoj, sintezo en kiu li konservis la bonajn, forĵetis la malbonajn kaj aldonis kelkajn novaĵojn lasttempe eltrovitajn, kaj nun li prezentas tutan lingvon pretan.« — Post la spertoj, kiujn la esperantistaro havas kun tiu ĉi sinjoro certe neniu el ni estos surprizita per tiu ĉi sciigo. Sinjoro Sausure opinias, ke multaj samideanoj lin malbenos kaj eble insultos, sed en tiu ĉi opinio li versimile eraras, ĉar lia ŝanĝemo nin ne plu povas mirigi. Ni lasos lin evoluigi, dume ni trankvile iros nian vojon.

»Kora nobelo«. Pastro Jaro Ŝeletzny el Plánice fondis antaŭ unu jaron ligon, kiun li nomas »Kora Nobeleco«. Tiam li turnis sin al ni kun

la postulo enpresadi sciigojn pri lia ligo kaj subteni per gazetartikoloj lian entreprenon. Lian postulon ni plenumis, kvankam lia entreprenon ne ŝajnis esti sufiĉe fidinta al ni. Sed ni atente observis lian agadon, tiom pli, ĉar de multaj flankoj ni estis atentigitaj pri lia agado. Tiu ĉi sinjoro batalante per la frazoj pri la kora nobeleco faras subfosan laboron inter la esperantistoj. »La Kora Nobeleco« estas nura allogilo por kolekti kiel eble plej grandan aron da esperantistoj en kiu li faras oftajn provojn, ĉiam tre singardajn, inokuli reformajn ideojn al la membroj de lia ligo. En la persona korespondado li jen kaj tie uzadas formojn idistajn por tiel trovi reformemulojn. Ni ankoraŭ ne scias, kiu el la samideanoj lasis sin kapti de li, sed ni atentigas la liganon je la adago de tiu ĉi ilia prezidanto, pri kies alia perfida ago ni parolos en la venonta numero. Nin malĝojigas la fakto, ke en la tempo, kiam ni plej multe bezonas plej severan unuecon, kiam ĉiu el ni havas moralan devon lasi flanke ĉiujn siajn privatajn gustojn pri ŝanĝoj de Esperanto, en kiu ni certe neniam povas esti unuecaj, ĉar pli granda parta de ni ilin ne aprobas — ne pro sia malprogreseco, kiel la ŝanĝemuloj deklaras, sed ĉar ili ne ŝajnas esti pli bonaj ol la nunaj formoj de Esperanto — povas sin trovi persono, kiu subfosas harmonion inter ni regantan. Kaj jen estas lia krima peko, peko tiom pli granda ke li en malica kaŝemo malbonuzas la konfidon de esperantistoj. La speco de la Ŝeletzny tute ne konvenas en nian epokon, eĉ ne en nian respublikon. Ĉiu el ni devas havi fortan kaj honestan karakteron, ni devas scii kion ni predikas kaj kial ni tion predikas, ni devas esti interne konvinkitaj, ke la ideo, kiun ni vastigas estas bona, kaj al la ideo al kiu ni servas, ni devas alporti eĉ oferojn. Kaj se ni perdas la kredon al iu ideo, aŭ se ni pro diversaj kaŭzoj ŝanĝas nian opinion, ni ne devas timi tion klare proklami, ĉar ni ne devas trompi, ĉar la veramo kaj sincereco estas ĉefa civitana virto. Kaj sinjoro Ŝeletzny ne estas verama, li ne estas sincera, li ne havas virtojn de respublikano, sed malvirtojn de Jezovito.

Konkurso. La eldona akcia societo Otava en Helsingsfors, Uudenmaank 10., Finnlando, publikas konkurson de anekdotoj kaj mallongaj rakontoj, kiuj montras malhelpojn de multlingveco kaj la bezonojn de la lingvo internacia, skizojn el esperantista vivo k. t. p. Kondiĉoj: ĉiu rakonto devas esti klare skribita sur unu flanko de papero paralele en du lingvoj esperanta kaj nacia. Oni klare monru la devenon. Premioj: Valoraj premioj por la tri plej bonaj verkaĵoj kaj por ĉiu uzita rakonto libra premio laŭ ĝia valoro. La konkurson povas partopreni esperantistoj de ĉiuj nacioj.

Universala Esperanto Asocio translokigis! Ĝia nova adreso estas: Bern, Museumstrasse 14. Svisio. Tie troviĝas nun ankaŭ la redakcio kaj administracio de »Esperanto«.

Al la abonantoj de la gazeto »Esperanto«! La abonantoj de »Esperanto«, kiuj pagis sian abonon pere de nia administracio kaj ne ricevas regule la gazeton, reklamu ĝin ĉe ĝia administracio en Bern, ĉar la gazeto estas sendata de ĝi. La reklamado ĉe nia administracio aŭ red-

akcio stas tute senefika! Denove ni atentigas, ke ĉiu loĝanto de Ĉeĥoslovakio, kiu deziras havi ĉi tiun gazeton devas antaŭe aboni ĉe nia administracio kaj poste li ĝin ricevos! Provnunmerojn ni ne sendas! Ni ripetas: Tuj post la ricevo de la abonsumo ni informas la administracion en Bern pri la farita pago kaj la administracio en Bern mem ekspedas la gazeton. Sekve ne postulu la gazeton de ni!

Gvidlibreto de mineja urbo Kladno kun interesa enhavo estas ricevebla por 1 K (ankaŭ en poŝtmarkoj) ĉe I. Esperantista klubo «Dr. Zamenhof» en Kladno, Tyršova ul. 983.

Edziĝo. Sinjoro Karel Ĉurda, membro de Esp. klubo en České Budějovice edziĝis kun fraŭlino M. Gabrielová. — Ni sendas al la novaj geedzoj korajn gratulojn kaj deziron de feliĉo en la nova vivo.

Deziro. So. Henri Debuissou, 12, rue Ernest-Lefevre, Gravilli-Ste.-Honorine, S. J., Francio, degiras ekligi komercajn rilatojn kun ĉeĥoslovakaj firmoj.

Komuna komitato de bohemiaj esperantistoj sciigas: La reprezentantoj de la komitato sroj. r. kons. Eiselt kaj dro Kamaryt prezentis la 9an de aprilo al ministro de instruado kaj nacia klerigo sro Haberman tri skribajn petojn celantajn faciligon de enkonduko de Esperanto en instruajn programojn de ĉeĥoslovakiaj lernejoj. La petskriboj postulas: 1. estu eldonita ministeria dekreto ordonanta al direktoroj de la duagrada lernejoj, ke ili penu faciligi kursojn por lernantoj de sia lernejo. 2. estu invitita reprezentanto de la komitato en konsilan komisionon por eksterlandaj kulturaj aferoj, kiu estis konstituita ĉe la ministerio. 3. estu invititaj reprezentantoj de nia movado en konstituantan enketon pri reformo de la instruado. — Sro. ministro akceptis ambaŭ sinjorojn tre afable, asertis ilin, ke li serioze interesiĝas pri la afero de la internacia lingvo kaj ke li rekomendos la aferon al la zorga studo de la ministerio.

Adreso de la Komuna komitato de bohemiaj esperantistoj estas provizore: Dr. Stan. Kamaryt, Karlín 475.

La Progreso fariĝas bona kaj ŝatata informilo de la fremdlando pri la interna stato de Ĉeĥoslovakio kaj de ĝia loĝantaro. Multaj naciaj gazetoj represas jam el ĝi sciigojn kaj artikolojn. Interalie la pariza ĵurnalo L' Humanité la 15. de majo sub la titolo «La misère du Peuple en Bohème» represas 45 liniojn el nia 3. numero kaj aldonis al ĝi propran komenton. Kiu el fremdlandaj samideanoj uzados La Progreson por represi el ĝi sciigojn en la nacilingvaj gazetoj, tiu ricevos nian gazeton senpage. Ni petas sendon de la gazetoj, kiuj alportas sciigojn el La Progreso por raporti al nia registaro pri nia informa laboro.

Respondo de la Ĉeĥa Akademio por scienco kaj arto al la Magiara akademio laŭ la nova decido de soj el «Komuna komitato esp.» en Praha ne estas ricevebla ĉe nia redakcio, sed sole ĉe so. J. Eiselt, Praha-Vinohrady, Slezska 58. — Ni bedaŭras, ke la proponintoj tiel facile ŝanĝas siajn decidojn kaj tial kaŭzas al ni eĉ al la petintoj senutilan tempoperdon.

La 1. kajero de la nuna jarkolekto de la Progreso estas jam tute elĉerpita, kaj tial la novaj abonantoj povas ricevi ĉi tiun jarkolekton nur sen la 1. kajero!

LETEROJ.

Post preskaŭ kvinjara interrompo de poŝtaj rilatoj kun Anglio ni estis gojigita per ricevo de kelkaj leteroj kaj kartoj el la lando, kiu en nia liberiga procedo ludis gravan rolon, kaj al kiu la bohema nacio ĉiam restos dankema. La leterojn de du leteroj ni represas:

Redakcio de The Esperanto Monthly.
Edinburgh.

Estimata Kunfrato, ricevinte hodiaŭ la numeron de La Progreso por jan.-feb. mi skribas por esprimi mian kontenton, ke per ĝi leviĝis por mi la kurteno, kiu kasis al mi Vian belan, kaj per mi amatan landon, dum preskaŭ kvin jaroj. Mi gratulas Vin pri la enhavo de Via gazeto, kiu estas la plej interesa nacia gazeto, kiun mi iam legis, kaj por mi ĝi estas ideala nacia esperanta gazeto, ĉar ĝi penas prezenti al la tutmondo bildon de aferoj en la lando mem, kiun oni ne povas ricevi el la tielnomitaj fremdaj telegramoj, kiujn oni precizas en la ĉiutagaj ĵurnaloj.

Kun nova saluto kaj bondeziro por Via nova respubliko sincere Via

W. M. P., redaktisto.

London, 12. 4. 1919.

Estimata Samideano, antaŭ du, tri semajnoj mi plezure ricevis ekzempleron de Via gazeto La Progreso, kaj nun, kiam la poŝtendo al Via lando estas libere malfermita, mi permesas al mi la plezuron gratulegi Vin pri la tre interesa kaj vigla enhavo de la gazeto. La Progreso estas ja vivanta ĵurnalo, ne nura organo de esperantistoj raportanta pri bagateloj de grupkunvenoj, festoj k. p. t. Via artikolo «La necesa reformo» estas bonega kaj trafa, kaj traleginte la gazeton oni devas konfesi, ke La Progreso certe praktikas tion, kion ĝi predikas.

Kun ĉiuj bondeziroj por la prospero de Via lando kaj Via esperanta laboro sincere Via

S. R. Marshall,

Hon. Sec. «Common Commercial Language Committee».

Vere karakterizan leteron ni ricevis de germana esperantisto el Vieno, kiun ni represas apud la du leteroj de la anglaj samideanoj:

Estimata sinjoro, estas jam sufiĉe konate al ĉiu germana esperantisto, ke La Progreso estas ŝovinistega gazetaĉo. Bedaŭrinde nur estas, ke la neutrala Esperanto devas tiom helpi al la disvastigado de ĉeĥaj mensogoj. Jam kelkaj artikoloj tute malplaĉis al mi. Tia artikolo estas ankaŭ «Internacia Danubo». Malvere estas, ke Danubo trafluas 145 km da «bohemia» teritorio, ĉar Danubo neniam trafluis boheman teron. Pressburg kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas kaj restos germana; se ĝi kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estos farigita ĉeĥa, ĝi estos ŝtelita mi ripetas: ŝtelita. La alia teritorio estas magiara. Se tiuj faktaj al vi ne malhepas diri, ke la citita teritorio estas bohema, tiam vi pruvas la veran karaktero.

ron de via nacio. Ĉefa friponeco estas deziri, ke la tutgermana parto de Danubo trafluanta Germanion kaj German-Aŭstrion estu internaciigita, t. e. »internaciigita« ne nur sub ĉefa hegemonio, sed sub ĉefa tiranado. Mi aldonas etnografian karton de eks-Aŭstrio.

Kun malsamsideana Esperanto saluto.

L. A. I.

Tiun ĉi leteron, tiom ofendigan ne nur por nia redakcio sed por tuta ĉefa nacio ni estus simple forĵetintaj en la paperkorbon, se ĝi ne estus skribita de samsideano, kiu estas komitatmembro de Viena esp. societo, sekve de la persono, kiu certe havas iom da influo je la opinio de aliaj samsideanoj, kaj tial versimile ekzistas en Vieno pli multaj samsideanoj kiuj egale pensas kun li. Kaj tial ni sentas la devon respondi:

Eraras tiu, kiu kredas, ke ni batalas kontraŭ kiu ajn nacio aŭ kontraŭ ĝiaj rajtoj je ekzisto. La idealoj de homaranismo al kiuj ni kiel esperantistoj servas, ne permesas al ni, ke ni deziru havi post la nova monda konstelacio subpremitajn kaj sklavigitajn naciojn. Kaj tial ni batalas kontraŭ la sistemo sklaviganta, kontraŭ tiu sistemo, kiu en sia blinda regadavido lasis droni la mondon en riveroj da sango, kiu punis ĉiun sopiron je libereco per ekzekutejoj kaj malliberejoj, kaj kiu krom la aliaj eĉ nian nacion sufokis dum tri cent jaroj. Kaj kontraŭ tiu sistemo ni ne batalas per mensogoj — sed per faktoj, kiujn ni prezentas por prijuĝo al la tutmonda esperantistaro, estante konvinkitaj, ke eĉ la Germanoj ne povas konsenti kun la agoj de siaj regnestroj. — — —

La riproĉojn kontraŭ la artikolo de prof. dro. Kamaryt respondos ĝia aŭtoro mem en la venonta numero.

S-on. L. A. I. ni sciigas, ke la etnografia karton, kiun li aldonis al sia letero (kaj kiu en malsamaj anglo-germanaj tekstoj parolas pri »ĉefa tiranio«, falsas la etnografiajn faktojn. Ne nur ke ĝi bazas sur la konata falsa populsumigo aŭstria, sed ĝi eĉ prezentas kiel germana la teritorion, kie ne loĝas 50% da Germanoj (Budějovice-Budweis kun ĉirkaŭaĵo, Brno-Brun kun vasta ĉirkaŭaĵo k. t. p.). Alie ni esperas, ke la esperantistaro de Wien ne konsentas kun la maldeca tono de la letero de s-o. I.

J. S. TURGENEV:

PENDIGU LIN.

Ĝi okazis en jaro 1803, — komencis rakonti mia malnova amiko — ne longe antaŭ la batalo apud Slavkov. Regimento en kiu mi servis kiel oficiro, estis dislokumita en Moravio.

Oni severe malpermesis al la soldataro ĉiun maltrankviligon aŭ subpremadon de la loĝartaro; ĉar sen tio, ĝi malkonfide rigardis nin, spite, ke ni estis liganoj.

Kiel serviston mi havis soldaton, iaman servutulon de mia patrino, nomatan Jegor. Li estis homo milda kaj honesta; ni konis unu la alian jam de infanaĝo kaj restis por ĉiam preskaŭ kamaradoj.

Iam okazis granda tumulto en la domo en kiu mi loĝis. Ekregis mallaŭdiga kriado; al la

mastrino oni ŝtelis du kokinojn, ŝi akuzis pro tiu ŝtelo mian serviston, li senkulpigis sin kaj vokis min por atesto . . . »Li kaj ŝteli, li, Jegor Avtamonov!« — Mi certigis la mastrinon pri lia honesteco, sed ŝi ne volis eĉ aŭdi pri tio.

Subite sur la strato estis aŭdebla amasa ĉevaltrotdado; ĝi estis la komandanto kun sia ŝtabo.

Li estis korpulenta, grasa viro kaj trotis malrapide kun nuba mieno, havante la epoletojn penditajn sur la bruston.

La mastrino ekvidinte lin — ĵetis sin antaŭ lia ĉevalo, genuis, — kaj kun disligitaj haroj komencis plendi pri mia servisto, montrante lin per la mano.

— »Moŝto generala!« kriis ŝi, — »mi petas, eldiru mem vian juĝon! Helpu: Protektu min! Tiu soldato prirabis min!«

Jegor tuj stariĝis sur la sojlo, kun ĉapo en la mano kaj kunfrapante la kalkanumojn li rektiĝis kiel kordo; eĉ la bruston li elstreĉis antaŭen, same kiel gardostaranta soldato, — eĉ unu vorteton li ne eldiris! Eble li ektimis tiun, en la mezo de la strato haltigitan generalŝtabon, aŭ li ŝtoniĝis pro timo, aŭtaŭsentante malfeliĉon kiu eble okazos, — mia Jegor staras, fermetas okulojn, kaj estas pala kvaŭzaŭ malviva!

La komandanto rigardis lin distriĝeme kaj malafable, poste li eligis ĉagrene: »Nu! Do!« — Sed Jegor, staras kiel statuo montrante la dentojn! Kiu observus lin de la profilo, tiu dirus, ke tiu homo ridas.

Poste diris la komandanto koncize: — Pendigu lin! — Spornis la ĉevalon kaj ek trotis antaŭen, — komence malradide — sed poste ekrajdis galope. La tuta akompanantaro sekvis lin; sole la adjutanto turniĝis en la selo rigardante oblikve Jegoron. Neplenumi la ordonon estis neeble . . . Jegoron oni tuj arestigis kaj poste forkondukis lin sur ekzekutejon.

Tiam li paliĝis kiel kadavro — kaj apenaŭ li eldiris dufoje: »Batjuŝkoj! batjuŝkoj!« kaj poste duonlaŭte: »Dio vidas, — ke mi estas senkulpa!«

Adiaŭante min li ekploris maldolĉe, tre maldolĉe. Mi estis proksima de frenezigo — »Jegor! Jegor — kriis mi malespere — »Kial vi ne diris tion al la generalo?«

Dio vidas — ke mi estas senkulpa — ripetis la kompatindulo plorante. — La mastrino mem konsterniĝis. Ŝi neniel atendis tian kruelan verdikton kaj ekploris ankaŭ. Ŝi petis de ĉiu pardonon, ke oni ne mortigu lin, certigante, ke la kokinojn ŝi jam trovis, ke ŝi mem ĉion klarigos . . .

Sed ĉio estis kompreneble vana. La militista regularo, kaj la disciplino! — La mastrino ploris kaj ĝemis pli kaj pli.

Jegor, kiu estis jam de la pastro konfespremita kaj de li la sanktan sakramenton akceptinta, turnis sin al mi. — Diru al ŝi, moŝto sinjora, ke ŝi ne turmentigu pro tio! . . . Mi pardonis al ŝi ĉion.

Mia konatulo ripetante tiujn ĉi lastajn vortojn de sia servisto, ekflustris: »Jegorĉjo, kolombeto mia, honestulo!« — kaj larmoj elfluis torrente sur liajn maljunigitajn vangojn.

Esper. Marie Kubásková.

KRONIKO.

Praha. Komuna komitato de boh. esp. kunvenis la 27. de aprilo en kafejo Union. La kunveno ĉeestis: f-ino. Šupichová, dr. Kamaryt, dr. Kohout, kons. Eiselt, Kraus, Pitlík, Hromada, Procházka (ĉiuj el Praha), Pech kaj Tittl (el Plzeň). Post la klarigaj vortoj de dro. Kamaryt pri la nuna asocia stato de bohemiaj esperantistoj laŭ kiuj oni konstatis, ke la Boh. Asocio Esperantista ĉiuforte klopodas ne esti barilo en la laboro celanta al la koncentrado de ĉiuj bohemiaj esperantistoj, kaj ke ĉiuj ĝiaj membroj sincere deziras ĉi tiun koncentrigon, oni decidis — ĉar komitato de Bohemia Unio Esp. ne plu ekzistas — demandi la membrojn de tiu ĉi centro (klubo en Ĉ. Budějovice, Kukleny, Kněževes, Kutná Hora), ĉu ili konsentas krei centron tute novan por ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Supozante, ke ĉiu boh. esperantisto aprobas ĉi tiun ideon, oni traktis pri la statuto de la nova asocio. Zorge ellaboritan proponon prezentis dro. Kohout. Laŭ ĝi la nova centro baze sur tute demokrataj kaj liberamaj principoj kaj kuniĝos esperantistojn de ĉiuj klasoj sociaj. La prezentita propono estis zorge tradiskutita kaj kompletigita. Ni esperas, ke inter la bohemia esperantistaro ne trovos sin samideano, kiu ne konsentus kun la ideo supre priskribita, kaj tial ke baldaŭ povos okazi la fondiĝa kunveno de la nova asocio: Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. — Esperantista klubo plifortigis per la membro de disiginta Societo esperantista kaj en sia ĝenerala kunveno (daŭrigo) okazinta la 7. de marto decidiĝis ekŝigi el la Boh. Unio Esp. kaj resti kontraŭ ĉiuj boh. asocioj tute neutrala. La komitato konsistas el sep malnovaj membroj de la klubo kaj sep nove aliĝintaj membroj de la societo. Prezidanto estas reg. kons. Eiselt, sekret. Rud. Hromada. La klubo kunvenas en kafejo »Union«, Ferdinandova tř., Praha II. — Konversacia kurso por progresintoj aranĝita de Boh. Asocio Esp. kaj gvidata de dro. Kamaryt finiĝis la 3. de aprilo: Ĝin partoprenis 20 personoj.

Praha. »Rondeto de esperantistinoj« kunvenas nun ĉiam lunde je la 7a vespere en Ženský klub (Jáma 5.) »R.« eldonis antaŭ nelonge propagandajn poŝtokartojn kun la surskribo »Učte se Esperantu!« Unu peco 14 h. Ĉiujn leterojn por la »R.« adresu al sekretariino Fina Sidonie Dlouhá, Praha, Stacidomo de Wilson.

Praha. Je la 3a de aprilo la **Esperanto unuigo »Verda stelo«** Praha, kiu prenis sur sin la taskon disvastigi »Esperanto« inter la germanlingvaj Prahanoj komencis sian propagandan laboron, per publica parolado, en la »Uranio-hejmo«, Pernštýn 6. — La kunveno estis multnombro vizitita. Post salutovortoj de Prez. So. Dr. Bischoitzky, paroladis Vicprez. So. Julio Boshan pri »Esperanto dum la paco kaj dum la milito«. La oratoro pritraktis per spritplena kaj bonege trapensita parolado la gravecon de internacia helplingvo, klarigis la esencon de Esperante kaj ties valoron kiel taŭga interkompreniĝilo. — Fine li raportis pri la movado dum la lasta tempo, kaj atentigis la aŭdanta-

ron je le apero de »Progreso« kiel bonege redigata Esperanto-gazeto, en nia respubliko operanta. Samtempe okazis esperanta ekspozicio kaj la ekspoziciitaj precipe la internaciaj gazetoj kaj kongresaj memoraĵoj interesege la ĉeestantaron. Post la parolado aliĝis pli ol 50 gepartoprenantoj al la kurso por komencantoj kaj tio estas la plej bona atesto por la plensukceso de konvinkanta parolado. Sekvontaj kunvenoj okazos ĉiulunde vespere je la 8 en la Uranio-hejmo.

Plzeň. Ligo de komercaj helpantoj komencis kurson por 28. siaj membroj, kiu okazas en la oficejo de la ligo. Instruas so. J. Pech.

Karlovy Vary. — Karlsbad. La 5an de Aprilo okazis parolado de Sro Franz Ulbert pri Esperanto. Ĉeestis ĉirkaŭ 180 personoj. Oni malfermis esperantajn kursojn kun ĉirkaŭ 150 partoprenantoj kaj grupo fondiĝis. Por la mondfama kuracurbo Karlsbad havas Esperanto gravan signifon.

Rakovník. Por revivigi Esp. klubon aranĝas s-o. J. Pokorný, fervojisto, esp. kurson, kiu partoprenas 25. personoj. Ĝi komencis la 2. de aprilo.

Olomouc. Esp. societo elektis la 9. de aprilo jenan estraron: s-oj. Kudela, prezid., prof. Murath, vicprez., Mastný, sekret., Wolf, vicsekret., Uhlíř kaj Neujil, komitatmembroj. Oni decidis aranĝi festkunvenon je honoro de dro. Zamenhof. — 16. apr. okazis la festkunveno en hotelo Laŭer. Post la festparoloj de soj. Kudela kaj Mastný (ĉeĥe) kaj Wolf (germ.) sekvis kantoj, muziko kaj recitaĵoj de membroj. La aktoroj de la urba teatro, f-ino Ostland kaj so. Franke, meritas dankon por la kunlaboro.

Olomouc. La 1/3. vizitis la ministro por instruado G. Haberman nian urbon. Deputacion de E. societo li akceptis tre amike k. promesis al nia movado simpatian kaj laŭfortan subtenon. La 3/4. parolis en hotelo Slavia sro. JUC. Josef Friedrich antaŭ bone vizitita kunveno kiel E. utilis al li dum la milito en Rusio, Anglio k. Francio. Lia tre interesa parolado estis aŭskultata kun granda atento. Al sro. Friedrich, ĉeĥoslovaka legiano el Francio esprimas ĉiuj aŭskultintoj koran dankon. Kolekto por E. blinduloj sumiĝis je 45 K 40 h. Por la sama celo ĉe olomouca tribunalo entreprenita kolekto ankaŭ de sro. Kudela sumiĝas je 20 K.

Prostějov. Esperantista Klubo kunvenis post la tutmonda milito la 2an de marto en ĝenerala kunveno, la unuan fojon en ĉeĥoslovaka respubliko. La prezidanto esprimis ĝojon, ke per memstareco de la nacioj oni atingos la veran internaciecon, kiun ni esperantistoj efike helpas. Post honoriga rememoro pri la Majstro Zamenhof kaj la mortintaj karaj anoj de la Klubo sinjoroj A. Dluhoš kaj J. Spitz estis elektitaj en komitaton fraŭlinoj M. Havránková kaj M. Trnková, sinjoroj J. Czuczka, S. Chojnacki, B. Ošťádal, dro R. Polanski, A. Tyl, K. Vopálka kaj R. Friedrich. Kunveno

ĉiusemajna en Litovelská pivnice. En la kurso instruadoj fino M. Havránková. Adreso de Klubo Strato Rejskova 10.

Wien. Esp. societo »Danubio« fondis interŝanĝan sekción por il. poŝtkartoj, poŝtmarkoj kaj koresp. kartoj. Ĉiuj samideanoj estas invitataj aliĝi. (E. S. »Danubio«, Wien I., Schulhof 2. III.) La klubano »Esp hejmon vizitas interalie f-ino H. Murko el Wartburg (Stirio) kaj so. Katz el Bukareŝti. La societo festis la 13. de apr. la naskiĝtagon de sia prezidanto so. dir. Kaftan en la salono de Hotel de France en ĉeesto de 150 personoj. Kiel gastoj kunhelpis: f-ino. Mira Reich, s-oj. Wilhelm, Wildman, Neuman kaj Adler.

Graz. Stiria esp. societo aranĝis la 20. de marto sian XIII. jarkunvenon, kiu elektis jenan komitaton: kolonelkur. dro. Diel, prezid., K. Bartel, sekret., K. Galisto, kas. — Son. P. Geier, kiu mortis dum la milito oni nomis honora membro. La societo realiĝis al la Provinca Porfremdula Ligo en Stirio. — La esperantistoj de Graz kunvenas ĉiuvendrede en la restor. »Zum Wilden Mann«, Johanisgasse.

Marburg. La loka grupo de S. E. S. elektis en sia 10. jarkunveno, okazinta la 17. de marto jenan estraron: JUDr. Haas, prezid., instr. Ledineg, sekret., jur. Dobravec, kas. La grupo havas 54 membrojn.

ESPERANTISMO EN KROATIO.

Druŝto Hrvatskih Esperantista (Societo de Kroataj Esperantistoj) komencis sian antaŭmilitan agadon en tre malfavoraj kondiĉoj. Ne nur la ĉie spertita indiferenteco kaj mokemo de la plejmulto malhelpis disvolviĝon de l' esperantisma penso en Kroatio, sed ankaŭ la politika situacio kaŭzis, ke ĉiu komune-homara penso restis nerimarkita en la bolado de la politikaj pasioj.

Tamen la fervoraj pioniroj de esperantismo en Kroatio, s-oj. Bothe, Vidak, Špicer, s-ino. Bedakoviĉ kaj aliaj ne laciĝis en senĉesa laboro por nia paca ideo, spite multaj malĉarmiĝoj, kiujn ili estis devigataj suferi.

La milito terure vekis esperantistojn el ilia sonĝo pri tuthomara familio, kaj ĉio bona, bela, ĝusta kaj vera devis retiriĝi antaŭ la frenezigantaj partianoj de la homa buĉado. Ankaŭ la kroata esperantistaro estis dispelita kaj al multaj el ni ŝajnis, ke nia afero frakasis por ĉiam. Tamen, kiel post la vintra frosto reviviĝas la ĝermoj per la unuaj mildaj blovetoj de la printempo, same ankaŭ la tuthomaj idealoj reviviĝas ĉie kaj ĉiam tuj, kiam la konscio ekklariĝas post la pasiaj eksplodoj de la nacieca malamo. La juna, sed jam fortika arbo de l' esperantismo ree burĝonas je ĉiuj siaj branĉoj, kaj el ĉiuj landoj

venas sciigoj pri vigliĝanta movado de nia anaro.

Sub influo de tiuj sciigoj ankaŭ la kroata esperantistaro ekmoviĝis, komencis labori kaj ni estas feliĉaj povante sciigi niajn ĉeĥoslovakajn samideanojn pri la neatendita sukceso, kiu rekompencis la klopodojn de niaj malnovaj pioniroj. En Zagreb estas malfermitaj jam tri kursoj kun pli ol 200 vizitantoj, kaj el kelkaj provincaj urboj venis demandoj pri propagandiloj kaj libroj. La nacia unuiĝo kun niaj serbaj kaj slovenaj fratoj vastigas treege nian laborkampon kaj jam tute nature stariĝas postulo pri organizo de unueca jugoslava esperantista movado. Ni laboras kaj ne dubas. Ni tute firme esperas, ke la terura sperto, kiun la milito trudis al ni, alportos almenaŭ tiun bonan frukton:

la konsciigon de la ideo, ke internacismo ne estas negacio de naciismo, kaj la malamo al alilandanoj ne estas nepra kondiĉo de propra nacieca prosperado.

Stanislav Tomić, Zagreb.

BONVULU LEGI!

»Esperanta angulo de blindula bohema gazeto »Zora« intencas eldoni refiefe presitajn esper. lernolibrojn. Ilia baldaŭa eldono estas nepre necesa, ĉar bohema blindularo montras vivan intereson pri esperanto, kion pruvas interalie arango de du elementaraj kursoj malfermitaj antaŭ nelonge en blindulejo de Klár en Praha. F-ino J. Šupichová permesis al ni afable uzi al tiu celo la materialon enhavitan en ŝia bonega, nigre presita esp. lernolibro.

Por igi la prezon de presotaj lernolibroj laŭeble plej malalta, ni volas uzi tiucele la sumon kolektitan antaŭ la milito plejparte inter bohema esperantistaro kaj amikoj de blinduloj por ebligi al kelkaj nevidantaj bohemiaj samideanoj veturon al X. a universala kongreso, dum kiu estis okazonta ankaŭ kongreso de blindaj esperantistoj. La tiamaj kolektintoj (S-oj K. E. Macan kaj Stan. Stejskal) publikigas tiun ĉi decidon por eviti eventualajn kontraŭdirojn de donacintoj pro ŝanĝo de antaŭa celo de l' monkkolekto.

Dume nuna politika situacio ŝovis internaciajn kongresojn al malproksima tempo, la enlanda propagando de nia lingvo vigliĝis denove kaj oni bezonas rimedojn por propagandi sukcese. Tial eble neniu el partoprenintoj de citita monkkolekto malaprobos nian speciale gravan decidon.

Se neniu el ili sendos ĝis 15. junio sian proteston laŭ suba adreso, ni juĝos nian pro-

ponon aprobita kaj uzos la monkollektion (Kr. 263.16) al financa garantiigo de nia lerno-libra entrepreno.

Stanislav Stejskal, profesoro
Kr. Vinohrady, Čermákova 6.

Noto: Tiu-ĉi propono nature neniel forigas la peton pri monkollektado, kiun oni publikigis en marta numero de »Progreso« kaj kiu estas uzota al fondigo kaj daŭra eldonado de »Esperanta anguleto« ĉe gazeto »Zora«.

KVITANCO.

Por interblindula propagando ni ricevis jenajn donacojn: Praha: J. Boschan, K 10.— f-inoj Šupichová, Moudra, Hrdinová kaj Pločká reprenis siajn dekkronajn subtenojn (obligaciojn) por La Progreso kaj difinis ilin por la blinduloj — K 40.— Plzeň: Ing. R. Novák K 20.—, A. Loukota K 10.—, gsoj. Brožík K 9.—, B. Tittl K 10.—, F. Zikan K 5.—, F. Kavan K 20.—, F. Šnábl K 4.—, J. Horák K 6.—, J. Pavlík K 3.—, F. Hahn K 2.—, gsoj. Kubásek K 5.—. Karlovy Vary: Němec K 20.—. Olomouc: so. A. Kudela, kolektis inter la oficistaro de la tribunalo K. 65.40. Tuta sumo: K 229.40.

BIBLIOGRAFIO.

Ivan H. Krestanov, **Bulgara lando kaj popolo**, 128 paĝa broŝurita libro 14×20 cm, aperis kiel 1. n-o. de la II. serio de la Bulgara Esperanta-Biblioteko. Prezo K 6.— afrankatite. Ricevebla ĉe la redakcio de »La Progreso«, Plzeň. — Al la verkinto de tiu ĉi libro oni povas varme gratuli, ĉar per ĝi li prezentas al la esperantistaro verkon per sia enhavo vere valoran kaj instruan. Ĝi traktas pri la historio, popolaĵmeroj, lingvo, kulturo, nacia vivo kaj pri la politikaj aspiroj de Bulgaroj per tiom koloriĉa maniero, ke post la finlego de la libro ŝajnas al vi, ke vi travivis en la mezo de tiu interesa nacio parton da via vivo, — Stile senrara. Al la libro estas aldonita etnografia karto.

Vilho Setälä: **Esperanta legolibro**. Broŝurita 108 paĝa 15×21 cm, eldonita de la Eldona Akcia Societo Otava en Helsingfors, Finnlando. Kun portreto de Zamenhof. — La belaspekta libro enhavas multajn, lerte kunmetitajn legaĵojn, komence en tre facite stilo por komencantoj. La libro estas rekomendinda ne nur por tiu, kiu volas konatiĝi kun esperanta stilo, sed eĉ por la perfektaj esperantistoj, ĉar ĝi enhavas multajn tre interesajn artikolojn. — En la libro ni trovis kelkajn esprimojn, kiuj al ni ne ŝajnas ĝustaj: La tuta **klaso** sin kolektis en la **klasejo**. — La urso estis preta bati la pafilon per sia **antaŭpiedo**. — Mi prenas **pe** unu **libron**. — Kien vi iras post **trinketinte** en la kafejo? — Post **estinte** en la kafejo. k. a.

Heinrich Seidel: **Vintro-fabeloj**. I. Volumo, tradukita de J. Bucker, eldonita de Ader & Borel, Esperanto Verlag, Dresden A. Libró bindita, 128 paĝa 12×15 cm. Prezo 2 M. 20 Pf. — Logante ĉi tiun libreton vi revenas al la feliĉaj

tagoj de via infanaĝo kaj al vi ŝajnas, ke ĉiun momente antaŭ viaj okuloj aperos iu feino, koboldo aŭ sorĉisto. — La libron oni povas varme rekomendi al ĉiuj esperantistoj.

»**A Common Commercial Language**«. An Address by M. A. Barton Kent, F. R. G. S. to the Members of the London Chamber of Commerce and Others. (Adreso de so. A. Barton Kent al la membroj de la Londona Komerca Ĉambro kaj al aliaj.) — La 16 paĝa 14×21 cm, anglalingva broŝuro prezentas raporton pri la kunvido okazinta la 31. majon 1918 en la Londona Komerca Ĉambro, dum kiu so. Barton Kent prezentis tre konvinkigan paroladon pri neceso de la komuna komerca helplingvo kaj pri Esperanto. — La prezo de tiu ĉi interesa broŝuro estas 3 pencoj.

»**An Appeal to Patriotism and Common Sense**«. (Apelacio je patriotismo kaj je sana prudento. Anglalingva 8 paĝa broŝureto 15×24 cm parolanta pri la postmilitaj komercaj rilatoj kaj pri graveco de Esperanto kiel komuna komerca lingvo. Jen estas ankaŭ enpresitaj kelkaj sciigoj de gravaj Anglaj firmoj pri praktika uzado de E. en la komerco kaj pri la internacia eksperimento aranĝita de so. Marshall en sep diversaj landoj (Anglio, Francio, Rusio, Portugalio, Hispanio, Argentino kaj Norvegio) per kiu la aranĝinto pruvis, ke post trimonata lernado de E. oni povas korespondi pri ĉiuj komercaj kaj eĉ aliaj aferoj. — Ambaŭ ĉi tiuj verkoj estas riceveblaj ĉe »The Common Commercial Language Committee, Ludgate Circus, London, E. C. 4.

KAREL HAVLIČEK BOROVSĜY:
(1848.)

LIBERA NACIO.

Kiu nur eĉ iomete konas la historion kaj la fluon de ĉi tiu mondo, tiu bone scias, ke neniu politika partio neniu nacio povas atingi la finan venkon alie, ol per sia propra interna forto, per tiu miluo, kiun li mem antaŭe akiris; sole tiu plej bone laboras por la liberigo de sia nacio, kiu helpas pligrandigi ĝian internan forton. Sed la forto de la nacio kuŝas en ĝia klereco, povebleco klopodemo, moralo, kaj senripoĉa reputacio, kaj ĉiu, kiu zorgas pri la pligrandigado de ĉi tiuj ecoj ĉe sia nacio, tiu helpas plej bone al la venonta libereco. Do ĉiu komencu antaŭ ĉio en sia propra familia hejmo, en sia ĉirkaŭaĵo kaj neniam potenco sur la mondo povas tion iel malpermesi al ni.

Tio laŭ mia opinio estas la ĝenerala kulturo nacia la sole vera kaj ĉefa rimedo, per kiu oni certe atingos la daŭran libercon kaj rajton, ĉiuj aliaj vojoj ne kondukas efike al la dezirata celo.

Revolucio, ribeliĝo povas ankau senigi la nacion de la subpremantoj, sed nur por mallonga tempo, ĉar se la tuta nacio ne estas kulturigita, ktera, reaperos baldau

ruzuloj, kiuj sur alia vojo klopodas per ĉiuspeca subpremado ŝarĝi denove la nacia nukon.

Pri tio la historio de la malnova kaj de la nova epoko nin instruas. Ĉar la nekultura kaj malklera popolo, nekomprenante ĉion tiel, ke ĝi mem povu juĝi laŭ sia propra intelekto, estas devigata al iu kredi, kaj agi laŭ lia konsilo; sed kiel facile oni povas en tiu konfido sin trompi kaj nur tiam oni ekkomprenas sian veran situacion, kiam estas jam malfrue.

Sed kulturigita klera homo ne bezonas kredi ĉion, kion oni diras al li, tia homo pripensas bone ĉiun diritan vorton kaj aliĝas poste al tio, kion li trovis plej aprobinda, plej justa, kaj plej utila.

Trad. Em. Kubásek.

J. SUPICHOVÁ:

ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

6a fragmento (el »Verkaro de Zamenhof«).

7a fragmento el »Verkaro de Zamenhof.« El lasta kongresa parolado de Dro. L. L. Zamenhof en VIII. kongreso en Kraków 1912:

« . . . Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kium ĉiu el ni uzas por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi . . . En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj »espero, obstino kaj pacienco«; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forĝesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan, gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: »konkordo.«

La knaboj kaj la pomo. Tria knabo venis. Li surhavis¹⁾ nigrajn vestojn. El la mano de la unua knabo li prenis la duan duonon de la pomo kaj diris: »Ĉi tiu duono de la pomo apartenas al mi. Mi estas el la pastra gento.²⁾ Miaj patro kaj parencoj servadas la Dion, kiu kaŭzas³⁾ ke ĉio kreskas. Li sendas sunon kaj venton, pluvon kaj froston. Do estas prave,⁴⁾ ke ankaŭ duono da pomo apartenas al mi.« Fino.

¹⁾ míti na sobě; ²⁾ rod, plémě, kmen; ³⁾ púsobiti; ⁴⁾ esti prava = míti pravdu.

Demandaro pri »La knaboj kaj la pomo.«
 1. Kion trovis unu knabo? — 2. Kie ĝi kuŝis? — 3. Kion li faris kun ĝi? — 4. Al kiu li aljuĝis la pomon? — 5. Kial? — 6. Kiu venis poste? — 7. Kiel li estis vestita? — 8. Kiu estis lia patro? — 9. Ĉu li volis ankaŭ la pomon? — 10. Ĉu li estis prava? — 11. Kiu ankoraŭ venis? — 12. Kiel tiu ĉi estis vestita? — 13. Al kiu gento li

apartenis? — 14. Kion li prenis? — 15. Al kiu efektive apartenis la pomo?

La homo kreas al si mem sian sorton evolunte aŭ pereante laŭ sia agado. La tuta ekzistado de la surtera homaro prezentas sole momenton en la eterneco. (Flamarion.)

La homoj mortas, sed semortaj estas la idealoj kaj ideoj. Labori por la ideo de la paco per la plej energia plinobligado de la spirito kaj per la malebligado de la militoj estos ĉiam unu el la plej belaj taskoj de la homo kaj precipe de la virino.

Trad. »Rondeto de esperantistinoj en Praha«.

Rusa lingvo. Dum tristoplena tempo kaj duba traktado pri la sorto de nia patrujo — vi estas mia sola konselo, kaj subteno, ho grandioza, majesta, vera kaj libera lingvo rusa! — Sen vi — kiel mi ne malesperus, vidante tion, kio hejme nun okazas? — Sed kredi oni ne povas, ke tia lingvo ne estus destinita al nacio granda!

En proksimaj tagoj aperos propaganda flugfolio:

Ĉeĥa uzado de Esperanto por informaj celoj

verkita de Dr. Kamaryt kaj eldonita de „La Progreso“.


Abonu kaj vastigu gazeton

»La Progreso«

!!!

PAPERON

pogrande eksterlanden eksportas
La Progreso - Plzeň.



Cigared-papero **Cigared-tubetoj**

WALDES & KO.
 Praha-Vršovice (Bohemio)

Le Rapport Quotidien
 Renseignements politiques.
 Revue des dépêches. — Nouvelles.
 Ĉiutaga gazeto franclingva kun semajna angla-
 lingva aldono. Monata abono K 10' —.
 Redakcio kaj administracio: Praha II.,
 Václavské náměstí 21.

Ĉeĥoslovaka Esperanto-oficejo
 (Ĉeĥoslovenská esperantská kancelář)
 Praha III., Nerudova ulice 40, III. p.
 (fondita de s-o. Aug. Pittlik)
 aranĝas Esperanto-propagandon, informas
 fremdlandon pri kultura kaj politika celado
 de la Ĉeĥoslovaka nacio kaj prizorgas infor-
 mojn pri eksporto kaj importo de ĉiuj komer-
 cajoj.

Bildon de la nacia vivo en Bulgario
 prezentas la libro de Ivan H. Krestanov:

**La Bulgara lando
 kaj popolo**

(128 paĝoj 14×21 cm kun etnografia karto).

Prezo K 6' — aŭfrankite. Ricevebla ĉe la
 redakcio de La Progreso.

La sola en la lando de Zamenhof
 aperanta gazeto estas
»Esperantista Voĉo«.
 Monata gazeto internacia
 Organo de Krakova Esp. Societo kaj de Varsovia
 Klubo Esp-ista, en kiu kunlaboradas i. a. Prof. Univ.
 O. Bujwid, Prof. Univ. Baudouin de Courtenay, Br.
 Kuhl, Nicoŝero Verdkapulo, Dro Leono Zamenhof
 k. a.

La jara abonprezo 10 K (6 M)

Adreso: „ESPERANTISTA VOĈO,“ Krakovo
 (Polio), Dietla 62 II.

Jus aperis:

Pres. prof. T. G. Masaryka:

**První poselství k národu
 československému.**

La broŝuro (bohemitksta) en bela mankolorita
 bindaĵo, kun portreto de Masaryk, bibliofile
 aranĝita, kostas 8'— K. Al societoj rabato.

Mendu ĉe esperanta firmo:

J. B. VLACH, Praha-II., Ferdinandova 38.
 Ankaŭ en ĉiuj librovendejoj ricevebla!



Kohi-noon
 BOUTONS PRESSION
Pressoir Waldes Breveté S.G.D.G.

Marque Mondiale



Prembutonoj
 Metalbutonoj
 Kudrilaĵoj



WALDES & KO.



Praha-Vršovice (Bohemio)

Legu la interesan verketon de J. S. Machar:

BENEDEK

Esperanta traduko de profesoro R. Fridrich.
 Eldonita de **J. KARÁSEK**, librovendejo
 en Prostějov-Moravio.

Fremdlandaj esperantistoj abonu

LA PROGRESO

ĉe so. **Svitberto J. Degenkamp**, del. de
 U. E. A.
 Utrecht, Betlehemweg 36, Nederlando.

Se vi deziras havi bonegan internacian gazeton,
 abonu :

» **ESPERANTO** «

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.
 MONATA GAZETO REDAKTATA TUTE EN ESPERANTO.

16--20 paĝoj de plej bona teksto.

Enhavo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri internaciaj problemoj, soci-
 alaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literatúraĵoj. — Esperan-
 tismo. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Lingvaj studoj.
 — Anoncetoj.

Jara abono: 12 kronoj, Luksa eldono: 14 kronoj, pageblaj al administr.
 de „La Progreso“ en Plzeň, aŭ Sro. Dro. Sós, Tuchlauben 18., Wien.

Senpaga **specimeno** laŭ peto de la administrejo:
Museumstrasse 14. Bern. (Svisio).

Tra la tuta mondo

flugos Via anonco, se Vi ĝin aperigos en

**Adresaro
de esperantistoj**Adresojn kaj anoncojn ĝis 20. de junio 1919
elpetas**BOHEMA ESPERANTO-SERVO**
Moravany, Bohemio.**NACIOTIPAJN**memorlibrojn, albumojn, notlibrojn, murkalen-
darojn, kadretojn, ĉiuspecajn skatoletojn**en artoplana, mankolorita aranĝo**

liveras esperanta firmo

J. B. Vlach, Praha-II.

Ferdinandova 38.

Postulu prezaron!

Postulu prezaron!

T. & A. BAŤA**ŝuofabrika kaj ledotanejo
ZLÍN-PARDUBICE.****Propraj vendejoj:**

Praha, Václavské náměstí 32

Brno, Koblížná ulice 24.

Opava (Troppau), Hrnčířská 14

Wien (Videň), Taborstrasse 17 a

Kraków, Szewska 22

Czernówitz, Rathausstrasse 4

Lwów, Akademicka 5

Łódź, Piotrkowska 74

Bratislava (Presburg), Michalovská 5

Przemysł, Franciskanska 25.

Zlín, náměstí 60.

Mor. Ostrava, nám. 14.

Znojmo, Kovářská 7.

Kroměříž, Komenského

nám. 107.

Přerov, Ferdinand. 15

Šumperk, nám. 27 28

Hodonín, Masarykovo

18

Olomouc, Kinopasáž

Val. Meziříčí, náměstí

Břeclava, Frant. Jos. 17

Nový Jičín, obch. dům

Jedek

Hranice, náměstí

Vyškov, Pánská 10

Svitava, Brněnská 4

Jihlava, Schillerova 5

Uherský Brod, náměstí

163

Kyjov, Komensk. tř. 4

Místek, náměstí 13

Vsetín, Dolní nám. 304

Kojetín, Masarykovo

náměstí

Krňov, Fr. Jos. nám. 12

Frýdek, náměstí

Trenčín, nám., budova

gymn. Pistr.

Malacka, Slovensko

Tmava, Hosp. banka

Žilina (Zsolna), Sze-

chenji 209

Nitra, Slovensko

Růžemberok, Slovensko

Užhorod (Kežmark)

Lučencec (Luczivna)

Nové Zámky

Baňská Bystřice

(Besztercebanya)

Košice (Kassa)

Liberec, (Reichenberg),

Schückerstrasse 34

Pardubice, budova

spořitelny

Kolín, náměstí 72

Ústí n./L... (Aussig a. E.)

náměstí 28

Hradec Králové, Palác

Zál. a úvěr. ústavu

Ml. Boleslav, Pražská

ul. 116/1

Jaroměř, Husova tř. 91

Jičín, Velké nám. 60

Čáslav, Palackého 63

Dvůr Králové, nám. 57

Německý Brod, Komen-

ského 153

Turnov, Palackého 145

Plzeň, Zbrojnická 3

Čes. Budějovice, Šter-

nekova 18

Kladno, Královská 38.

Jindř. Hradec, Palac-

kého 94

Příbram, náměstí 142

Tábor, Třída Čes.-sl.

legií 640

Písek, Riegrovo n. 26

Louny, Žižkova 305

Náchod, Pražská 63

Klatovy, nám. 170/I.

Karlovy Vary (Karls-

bad), Fr. Jos. tř. 607

Most (Brüx), nám. 82

Amstetten, Viehdor-

ferstrasse 4

Wner, Neustadt (Vid.

Nové Město), Kaiser

Wilhelmstr. 64

Esperantia entrepreno. — Oni parolas kaj korespondas esperante.Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul.
Presis: Laborista presejo, Plzeň.